6-a Jaro. N-o 285

APERAS  SEMAJNE

Leipzig, 20./3. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerĥner

LA INDUSTRIIGO EN SUDA USONO KAJ LA NEGRA PROBLEMO

La 12 milionoj da negroj en Usono, kiuj reprezentas preskaŭ 10% el la tutlanda loĝantaro, liveras al la Sud-ŝtatoj pli ol ¼ el ĉiuj loĝantoj, k en kelkaj regionoj (eĉ tutaj ŝtatoj), kiuj estas situitaj dense apud la "nigra zono", ili reprezentas 40—50% k pli de l' popola kvanto.

La plej granda parto de l' negroj loĝantaj en Sudo okupas sin pri terkulturo, la transformado de l' plantejoj, kiu necesigas grandkvantan manlaboristaron. Esenca rolo apartenas al kotono, poste al tabako, rizo k sukerkanoj.

La grandega plimulto de l' negroj okupitaj en terkulturo estas farmluantoj. Dum en tuta Usono ili reprezentas 38% de l' terkulturistaro, oni nombras 66,2% da ili inter la negraj terkulturistoj, kaj 80% inter la negroj en Sudo. Granda parto da farmluantoj estas tributdevaj.

Unu el la distingaj faktoj estas, ke en la epoko de l' plej granda disvolviĝo de la plantejoj en Sudo, sklavo bonsana valoris 1500 aŭ 2000 dolarojn; ankaŭ la posedanto estis interesita konservi la sumon elspezitan k faris sian plejeblon por nutri la "homan brutaron", pro timo, ke ĝi pereu. Hodiaŭ, la grundposedanto provas elpremi el siaj negroj-farmuloj la kiel eble plej grandajn profitojn, poste tute senĝene liberigas sin de ili k elektas aliajn inter la sennombraj kandidatoj.

La negra farmulo en Usona sudo distingiĝas de l' salajrulo nur per tio, ke li devas elporti ekstrajn ŝarĝojn, kiujn li ŝuldas al la ekspluatado de l' komerca k financa kapitaloj, per la risko, kiun donas la kotonproduktado ekstreme nefirma k kiu dependas, en taksebla mezuro, de l' vetero, de l' detruaj insektoj k de l' prezŝanceliĝoj.

Laŭ statistiko farita en 1920 oni nombris 1,2 milionojn da terkulturistoj, plejparte negroj, en Usono. Laŭ ĉi-vintraj taksoj oni povas diri, ke la nombro estas multe pli granda, eĉ superas 2 milionojn. Ilia vivnivelo estas tiu de l' farmluantoj; en la tipaj kotonregionoj (Suda Karolino, Georgio) ili akiras proksimume 20 dolarojn monate, en iuj aliaj 22—23 dolarojn. Necesas diri, ke tiuj salajroj fiksiĝas nur por la sezono, t. e. la daŭro de kelkaj monatoj.



Oni aplikas en la kotonregionoj tre larĝe la virinan k infanan manlaboron. La salajro, kutime 4 dolaroj semajne, estas malsupera al ĉiuj plej malaltaj buĝetoj k permesas nur malsat-ekziston. Ĝi estas la meza vivnivelo de l' granda plimulto da negroj-farmlaboristoj en Sudo. Iliaj loĝejoj estas simplaj lignokabanoj sen ia ajn komforto, kiel akvo, kanalizo, elektro ktp. La meznorma sumo elspezata por la instruado al infano estas 5—6 dolaroj, t. e. 5- ĝis 10-oble malpli ol por blankula infano.

Al tiu ekonomia situacio aldoniĝas neaŭdita socia subprem-sistemo. Ĉie estras en registaraj kaj juraj institucioj la blankuloj. La negra etburĝaro ja enpenetras iom post iom la malgrandan komercon, sed neniam estas allasata en la ekonomiaj gvidorganoj — bankoj, industrio, transportoj. Ankaŭ la tuta grundo k ĉiuj produktiloj troviĝas en manoj de areto da posteuloj de l' antaŭaj sklavtenantoj, por kiuj laboras la nuntempaj sklavoj.

El 3 milionoj da farmoj ekzistantaj en Usono, en 1925 troviĝis 2,3 milionoj, do pli ol tri kvaronoj, en la manoj de blankaj farmistoj. Laŭ aliaj informoj nur 160 mil negraj farmistoj posedas sian grundon. Preskaŭ ĉiuj negraj farmistoj (proks. $^{9}/_{10}$) k terkulturistoj estas okupataj de blankaj farmistoj. Ĉiuj klopodoj de l' burĝaro k grundposedantaro celas konservi tiun ĉi monopolon de ekspluatado. Por tiu celo ekzistas multnombraj sociaj, juraj k kulturaj superstrukturoj, kiuj ĉirkaŭas la negran loĝantaron de l' Sudo per atmosfero de malamo, subpremo, linĉado, nepunataj atakoj ktp.

La industriigo, certe, plirapidigas la procezon de malkonsistiĝo de la terkulturo, la malriĉiĝon k forpuŝon de l' grandaj amasoj terkulturistaj en la Sudo, unuavice de l' negra loĝantaro. Okaze de l' lasta batalo pli ol miliono da negroj elmigris norden. Samtempe kun la migra movado oni vidas progresi la nombron da negroj en la urboj de l' Sudo, kie ili akceptas ian ajn laboron, eĉ la plej malpuran kaj plej malbone pagatan. Estas nur unuopuloj, kiuj sukcesas akiri pli kvali-

Kiu kaj kial likvidas preĝejojn en USSR?

Tra tuta Eŭropo, tra Ameriko nun estas furioza agitado kontraŭ "persekutoj" al religio en USSR. La tuta kapitalista mondo, ĉiuj papoj, pastroj ĉiureligiaj krias pri tio. Ŝajnas, ke dion kredantaj laboristoj estas pretaj fidi ĉi tiun agitadon.

Interalie tiuj "klasbatalaj" agitantoj multe rakontas pri likvido de preĝejoj en Sovetio, deklarante, ke ĉi tiuj preĝejoj estas perforte deprenataj de religikomunumoj, detruataj laŭ decidoj de ateistoj k. s. Ni ricevis jam multe da leteroj el eksterlando, urĝe petantaj respondi: Ĉu tio estas vero? Ne, tute ne, ni devas respondi: ĝi estas vera mensogo.

La soveta leĝaro ĝuste difinas la ordon de l' likvido. Unua regulo estas, ke nur voĉdono de l' tuta balotrajta laborula loĝantaro povas k rajtas decidi likvidon k utiligon de likvidita preĝejo por aliaj celoj. Sendube ĉi tiun voĉdonadon partoprenas ĉiuj balotrajtaj personoj, ankaŭ religianoj. El ĉi tiu regulo ekzistas nur sola escepto, nome ke preĝejoj povas esti likvidataj laŭ senperaj decidoj de sovetaj organoj: se la preĝejo malhelpas la stratan movadon aŭ ĝi estas danĝera por vizitantoj pro sia konstrua malfortikiĝo, pro ebla katastrofo. Tiuokaze ĉiuj membroj de la religia komunumo estas aligataj al plej proksimaj preĝejoj, aŭ sovetorganoj prezentas al religianoj alian ejon.

Dua regulo postulas nepran konfirmon de l' decido, farita en laborulaj kunvenoj, de sovetaj organoj. Finkonfirmon donas landa Plenumkomitato de Soveto (jam la kvara soveta instanco); nur post tio la preĝejo povas esti likvidata aŭ uzata por aliaj celoj. Tamen la sovetaj organoj ne konfirmas la decidon, se estis sufiĉe multaj voĉdonintoj kontraŭ la likvidon k pro tio la preĝejo restas je dispono de l' religianoj.

Tria regulo: post tiu findecido pri la likvido, la religianoj rajtas apelacii dum du semajnoj al plej supera sovetorgano en soveta respubliko, al Centra Plenumkomitato de Sovetoj. Pro apelacio neniu rajtas depreni preĝejon ĝis findecido de l' Centra Plenumkomitato. Ĉi tiu ordo estas severe plenumata; eĉ en multaj okazoj, kiam sovetorganoj ne permesis likvidi preĝejon, la postulintaj amasoj multe indignis.



La kapitalistoj de l' mondo protestas kontraŭ la religiaj "persekutoj" en USSR kaj ploras larmojn... petrolajn! (Isvestia, Moskvo.)

Lastatempe, kiam vaste efektiviĝas en la kamparo kolektivigo de l' kamparanaj agrikulturaj mastrumejoj, evidentiĝis tre multnombra likvido de preĝejoj, preskaŭ elementa, vastega, sed la reguloj de l' likvidordo estas konservataj tutplene ankaŭ nune. Vere en iuj lokoj kamparanoj de nove organizitaj terkultur-kolektivoj, ne dezirante atendi findecidon de l' sovetorganoj, mem utiligis tuj la preĝejojn por mastrumaj bezonoj de l' kolektivo. Tamen en tiuj okazoj, kie estas nelaŭleĝaj likvidoj k estis sufiĉe multaj voĉdonintoj por konservi la preĝejon, la sovetaj organoj punis lokajn gvidantojn k eksigis ilin de l' postenoj. Ni devas tamen noti, ke similaj okazoj estis tre maloftaj, estas kalkulataj nur po unuoj.

Vera kaŭzo de l' amasa likvidado estas plena ekonomia alikonstruo de l' vilaĝo laŭ kolektivaj principoj, la grandegaj sukcesoj en la socialisma konstruado ĉu en urbo, ĉu en kamparo k devenanta el tio plej energia kresko de l' ateismo en laborulaj amasoj.

La amase venantaj en la kamparon traktoroj, organizita kolektiva laboro en terkulturaj unuiĝoj de l' kamparanoj faras tute malbezona iun dion kun ties kulto, ĉar la kamparanoj tute evidente nun sentas sian forton, kaŭzatan de l' nova tekniko k labororganizado, kontraŭ naturaj elementoj k *kulaka* ekspluatado. Ili ne bezonas nun kredi, esti konfesianoj, ili bezonas la sciencon. Kvazaŭ subite ili fariĝas ateistoj, postulas likvidon de l' preĝejoj.

Diversaj mastrumaj k kulturaj bezonoj de l' nova kolektiva vivo instigas kamparanojn entuziasme alikonstrui likviditajn preĝejojn por deponejoj, grenejoj, metiejoj kolektivaj, por legejoj, lernejoj, teatroj ktp.

La sama psikologia procezo elmontriĝas ankaŭ en la urbo, kie grandskale influas la industriigo, multe sukcesiganta la socialisman konstruadon. La lasta postulas nun tro multnombrajn novajn arojn da teknikgvidantoj, ankaŭ ĝi postulas plialtigon de teknikaj konoj inter vastaj laboristaj amasoj. Kulturaj bezonoj tre rapide kreskas, la ejoj por ili mankas. Estas nature, ke dum revoluciaj jaroj k socialisma konstruado la laboristoj senreligianiĝintaj nun amase postulas utiligi preĝejojn por kulturaj bezonoj.

Traktante la kaŭzojn de ĉi tiu ateismiĝo de vastaj laborul-amasoj mi tute ne volas esti senbaza. La legantoj de "S-ulo" jam kelkfoje legis koncernajn faktojn el Sovetio. Ĉi tiuj faktoj estas nekalkuleblaj, mi nur citos kelkajn lastdatajn. (Finota.)

N. Incertov (259).

---

fikitajn poziciojn, kiuj estas konsiderataj kiel monopolo de la blankuloj. Kiel en la nordo, la negroj vivas en la plej malbonaj kvartaloj de l' urboj; ili pagas lusumon relative pli altan ol la blankuloj por siaj loĝejaĉoj, ĉar ili estas "nedezirataj loĝantoj".

La industriigo de l' Sudo plirapidigos la finan ruiniĝon de l' terkultura negra loĝantaro. Centmiloj da farmluantoj negraj estos definitive eliminitaj el la terkulturo. Speciala gravo apartenos al la disvolviĝo de l' mekanikigo en la Sudŝtata terkulturo, precipe en la kotonkulturo. La perfektigo de l' maŝinoj por la kotonrikolto signifos profundan ŝanĝiĝon en la laborkondiĉoj de l' kotonkulturo k tiel en la tuta vivo de l' negra loĝantaro terkultura. La negroj daŭros serĉi novajn profesiojn. Ankaŭ la mastraro provos utiligi la negrojn kiel strikrompantojn, konsidere al la disvolviĝo de l' strikmovado ĉe la Sudŝtataj laboristoj.

Sed la anstataŭigo de l' blankuloj per negroj elvokos la delonge metode kulturitan ras-malamon de l' blankuloj kontraŭ la negroj, kies fortega eksplodo transirus la gradon deziritan de l' mastraro mem k endanĝerigus la "publikan ordon". La negra migrado al nordo antaŭvideble kreskos pli k pli, sed ankaŭ la ŝancoj tie trovi laboron pli k pli malgrandiĝos, k tiel la negroj unuavice estos la viktimoj de l' senlaboreco.

Laŭ artikolo de *Rubinŝtajn* en "Bulteno de Internacia Sindikata Komitato de Negraj laboristoj ĉe ISR" kompiltradukita.

ATENTIGO!

Oni daŭre sendas al la Redaktejo leterojn ne sufiĉe afrankitajn; ni sciigas, ke tiajn leterojn ni ne akceptas k rifuzis plurajn lastatempe. Sekve la sendintoj ne miru, se ili ne ricevis respondojn aŭ se ne aperos iliaj manuskriptoj.

Unu el la interesegaj popular-sciencaj broŝuroj eldonitaj de SAT-Kooperativo estas

SEKSPSIKOLOGIO

Originale verkita de S. ZIEGLER.
Serioza traktaĵo bazita sur la esploroj de la moderna psikoanalizo. 54 pĝ. Form. 11×14 cm. Prezo 0,60 mk. g.
Administrejo de SAT, Colmstr. 1
Leipzig O 27.

ORIENTLANDO KAJ OKCIDENTLANDO

Lakŝmisvar Sinha

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

Nun mi volas iomete trapasi la pasintan k historian rilaton inter Oriento k Okcidento. La historio klare diras, ke la orienta civilizo estas multe pli malnova ol la okcidenta — se ne la plej malnova en la mondo. Antaŭ Kristo — dum la kreskinta greka civilizo — la grekoj aŭdis multon pri la riĉo de l' Oriento. La unua greko, kiu lernis k prunteprenis la filozofion el Hindio, estis la filozofo Pitagoro. Li vivis ses cent jarojn a. K. Li ankaŭ lernis el Hindio la elementan matematikon. Poste la historie fama reĝo Aleksandro — 327 jarojn a. K. — atakis Hindion, batalante kontraŭ la tiama regnestro en tiu lando. Sed li malsukcesis. Poste aliaj grekoj, kiel Salukas, ankaŭ volis konkeri Hindion, sed ankaŭ ĉi tiuj devis forkuri.

Dum tiu tempo la greka konsulo Megasteno, kiu pasigis longan tempon en Hindio, skribis multe pri la riĉo k gloraj kondiĉoj de la lando k civilizo. Li oficis kiel konsulo en la parlamento de la tiama tuthinda regnestro: *Ĉandra Gupta*. Laŭ la opinio de la historiisto la reĝimo de Ĉandra Gupta estas unu el la plej gravaj en la tuta homara historio. Dum lia reĝimo la lando k popolo estis tre riĉa k morala. Post tiu tempo la fama ĉina vojaĝanto Honen Tsang, kiu forvojaĝis el Ĉinio en la jaro 629 p. K., travojaĝis la tutan Hindion k studis tie longan tempon, en la fama universitato Nalanda. Poste li reveturis al sia lando k skribis: "La lando k popolo estas tre riĉaj. La komuna k morala vivo de la popolo estas tre alta. Ĉiu homo estas gastama. Ne ekzistas ŝtelistoj. En ĉiu vilaĝo troviĝas lernejo, kie ĉiu infano ricevas edukadon. Preskaŭ en ĉiu vilaĝo troviĝas domoj por vojaĝantoj, en kiuj ili povas loĝi senpage. La intereso de la popolo por kulturo k edukado estas tre granda", ktp.

Longa tempo pasis. En jaro 1502 p. K. Vasko da Gama trovis la marvojon al la orientlanda mondo, aparte al Hindio. Kompreneble la homoj en la okcidentaj landoj jam depost la greka tempo havis la ideon, ke Oriento estas tre riĉa; aparte ili havis tian ideon pri Hindio, ke la lando estas kiel arbo de riĉo. Post la trovo de Vasko da Gama multaj okcidentanoj venis en Hindion por skui tiun arbon k kolekti ĝiajn fruktojn. De tiu tempo la vera ekspluatado de okcidentanoj okazis. Portugaloj, holandanoj, francoj k. a. venis unu post la alia, k fine venis anglaj komercistoj kun la sama intenco. Ili batalis kun la aliaj nacioj k kaptis mem Hindion per glavo k per ne tre morala maniero.

La Kapitalista Milito



En la ekspozicia salono de l' "Sendependaj" artistoj en Parizo estis elmontrata la bildo ĉi tie reproduktita, pentrita de G. M o r o (Moreau). Ĝi trovis pro sia trafa maniero kondamni la militon k ĝiajn aŭtorojn, la kapitalistojn, la malkaŝan laŭdon de ĉiuj sinceraj kontraŭmilituloj, sed ankaŭ la malplaĉon ĉe la reakciuloj.

Pro instigo de tiuj lastaj la bildo estis forprenata el la salono de la polica prefekto. Post interpelacio ĉe la parlamento, ĝi reaperis en la ekspozicio, sed nur por malmulte da tempo, ĉar vandaloj malpurigis ĝin du tagojn pli malfrue per inko.

Estas historia tragedio. Paroli k ripeti pri tiu ekspluatado estas malfacile, malĝojige por mi. Eble vi scias, ke la angloj dufoje militis por tio ke la ĉinoj konsumu opion. Tiel devigi alian homon sin malsanigi — pro malmorala motivo — k samtempe ricevi profiton, ŝajnas esti la ĉefa plano de la okcidentlanda politiko. Multaj eŭropanoj krias ripete hodiaŭ al ni, al la mondo: "La nacioj en Oriento ne povas regadi sin mem!" Mi volas demandi al vi: Ĉu la fortaj k brutaj nacioj havas la rajton pritrakti k subpremi la moralan rajton de aliaj nacioj? Ĉu *tiu* povas esti juĝisto, kiu batalas kontraŭ ni pro memprofito?

Nun Hindio suferis k suferas tiel multe, ke la lando, kiu produktis la plej altan k gloran civilizon k kulturon, la lando, kiu estis la plej riĉa k kiu donis multon al la okcidentlanda civilizo ĉiel — hodiaŭ post longtempa ekspluatado de fremduloj estas unu el la plej malriĉaj landoj en la mondo.

Hodiaŭ Oriento tute ne kredas je la moralo de l' Okcidento. Eĉ pri bona k amika propono de okcidentano la orientano dubas — dubas profunde.

Ĉi tie mi volas antaŭ la fino prezenti al vi tion, kion skribis la fama anglo *rev. C. F. Andruz* (Andrews) en tiu ĉi jaro rilate al Oriento k Okcidento: "Mi volas certigi mian legantaron — post mia dudekkvinjara sperto — ke Hindio estas tute kapabla regi sin mem. Ĝi havas siajn proprajn metodojn, sed la metodoj estas ĉiam moralaj k bonspiritaj. Dum la pasinta tempo la hinda popolo ĉiam respektis k adoris siajn moralajn gvidantojn pli ol aliaj popoloj. Kaj hodiaŭ estas same. Mahatma Gandi estas la plej morala gvidanto, kiu povas gvidi la landon." Tia estas la opinio de fama anglo."

Mi diris antaŭe, ke Oriento profunde malfidas Okcidenton hodiaŭ. Oriento vidis k ankoraŭ vidas la okcidentlandan spiriton, vidas, ke la okcidentano agas en la historio havante biblion en unu mano k glavon en la alia. Hindio — granda parto de la mondo, kie loĝas 1/5 de la homaro, estas regata de Britio per glavoj. Hindio regis sin mem dum tri mil jaroj kun granda gloro. Hodiaŭ ne nur en Hindio, preskaŭ en la tuta Oriento, ekzistas forta movado por rehavigi la liberon — la moralan k denaskan rajton — k tiel savi sin mem el la ekspluatado de la okcidentlanda kapitalismo.

Kompreneble tio, kion mi parolis ĝis nun, tute ne estas komplimento al Okcidento. Tamen mi volas memorigi vin pri tio, kion mi diris antaŭe, por ke vi ne miskomprenu min. Ni, la orientanoj, bone scias, ke inter la okcidentanoj ekzistas du klasoj, ekspluatantoj k ekspluatatoj. Kompreneble ni profunde malamas la unuan klason. Samtempe ni respektas k amas tutkore la homojn, kiuj bataladas por la homaraj rajtoj en la mondo k por starigi justan socion.

Post 1 semajno ĉiuj kvaronjaraj abonoj finiĝos — tuj reabonu!

SUB LA JUGO DE L' ISLAMO

Absurdo, fanatiko kaj malbonfaroj de la mahometana religio

Inter la plej abomenaj malbonoj, kiuj pezas sur Alĝerio, estas la *marabutismo* (Marabutoj nomiĝas mahometanaj pastroj). Tiu plago estas tiom danĝera kiom ĉia ajn kataklismo. Ĝi tenas sub la jugo 5 milionojn da individuoj. Se ĝi, laŭ la manieroj, diferencas de l' kristanismo, ĝi tamen havas ties tutajn malvirtojn k ĉiujn absurdojn. Dum la kristanismo turnas sin precipe al la virino, la islamismo okupas sin nur pri la viroj, ĉar la virino estas, laŭ la Korano, "ŝarĝobesto" havanta nenian valoran kapablon. Per tia malŝatego al la virino ĉi tiu reflekte estas ankoraŭ pli submetita al superstiĉoj, kredoj, fetiĉismo k la tuta skalo da stultoj, kiuj estas ĉe la bazo de ĉiuj religioj.

Ekzistas en Alĝerio multnombro da pie respektegataj m a r a b u t o j , kiuj havas templojn en diversaj regionoj, kie ili vivis kiel veraj suverenoj. Je iliaj nomoj ĵuras k ĵurrompas la mahometanoj. Tiuj marabutoj apartenas al la pasinto. Sed la marabuta digno estas hereda, transiras de patro al filo. La potenchavaj pastroj konsistigas spiritan k eĉ materian (bienoj, monrezervoj) aristokration kun heredrajtoj. Ili havas grandan influon sur la tutan landon.

Apud tiuj unuarangaj marabutoj, kompareblaj al ĉefepiskopoj, ekzistas granda serio da malpli gravaj marabutoj, kiuj tamen same kiel la unuaj vivas per la oferdonoj de la kamparanoj aŭ marĉandistoj. Tiuj estas sorĉistoj, profetoj, preĝdiristoj, derviŝoj ktp. Ili havas mil nomojn, sed iliaj agmanieroj estas la samaj. Almozule ili iras vendrede en la loĝejojn k magazenojn por preĝi psalmojn ĉe siaj klientoj.

Tria speco de sanktuloj estas ŝtatoficistoj similaj al la grandaj marabutoj laŭ sia instruiteco. Ili ofte estas troveblaj en komunumaj administracioj, kiel notarioj, societ-kasistoj ktp. Tiuj "artefaritaj" marabutoj kreitaj de l' franca registaro havas ĉe siaj samreligianoj konsiderindan influon, kiel cetere ĉiuj intelektuloj super tiu en spirita sklaveco tenata amaso.

Kiel meti-prepariĝas la popolstultigantoj

La "Medersah" estas iel la granda araba kolegio de Alĝerio. Ekzistas unu en Tlemcen, sed tiu en Alĝero estas la plej fama. El tiu lernejo venas la delikata floro de l' indiĝenaj kleruloj, la estontaj juĝistoj-notarioj, jurprofesoroj. La studoj ĉe "Medersah" estas sufiĉe malfacilaj, ĉar la studentoj devas profundiĝi en la araban literaturon k disertacii pri la Korano k mahometana juro. Sed bedaŭrinde tiuj studoj fuŝas la spiriton de iuj studentoj, kiuj anstataŭ fariĝi kleruloj, fariĝas mistikuloj, ekstazuloj, personoj kredantaj sin tuŝitaj de l' sankta spirito, ĉar ili parkeras la litaniojn de l' profeto.

Estas evidente, ke se tiuj, kiuj formos la distingularon de l' indiĝena socio, kiuj devos gvidi ĝin, estas saturitaj de tiuj arkaikaj principoj, la amaso ne kulpos esti tiom malprogresema, superstiĉega, fanatika, plena je fanatiko iafoje terure barbara. Ĝi ja havas nur gvidantojn vasalajn al dogmoj pli idiotaj ankoraŭ ol tiuj de l' katolika religio! . . .

Oni devas konfesi, ke se ekzistas ĉie moskeoj, kiuj levas ĉielen sian minareton en formo de longa kandelo, multaj indiĝenoj ne estas religi-praktikantoj. La amaso, la plimulto de l' loĝantaro, estas tro absorbita de la materia laboro, ofte tre peniga, por panakiri. Ĝi forgesas pro tio la ritojn . . . k sian religion. Estas ĉefe la multspecaj marabutoj ĉiagradaj, kiuj alportas la akvopoton por la preĝoj k alvokas Allaĥon k Mahometon, lian profeton.

En la urboj la kreduloj estas malpli nombraj. Pli okupitaj per sia ĉiutaga laboro, pli instruitaj, en kontakto kun la laboristoj, komercistoj k eŭropanoj ĉiuklasaj, ili evoluas pli facile k estas malpli elrabeblaj de l' mahometana religio. Tamen ili observas, ĉu pro konvinko, ĉu por plaĉi al sia familio, ĉu pro senenergieco, ĉiujn festojn de la jaro k sian malbenindan fastotempon. Ili ne nur mallaboras okaze de l' festoj, sed oferas al sia dio ŝafojn, kokidojn ktp. k manĝas specialajn kukojn.

Religiaj ritoj k kutimoj

El la severaj laŭ-koranaj kutimoj ni menciu kelkajn karakterizajn: La arabo manĝas neniam porkaĵon. Sed nur pro kutimo; li ne scias, ke en la

---

KULTURTASKOJ

M. K r j u k o v

(5-a daŭrigo. Vidu n-ojn 279/83)

6. En Ekonomio

6. 1. La tuta mondo nun ricevas per utiligo de minkarbo 235 milionojn da ĉevalpovoj, per nafto 50 milionojn k per akvoenergio nur 24 milionojn da ĉevalpovoj. Provizoj da nafto k karbo minacas ne pli ol post unu jarcento elĉerpiĝi k starigi civilizon de l' tuta homaro antaŭ neniam spertita grandega krizo[1]. Atentu estonton, akcelu ĉesigon de malŝparo de valoregaj nafto k minkarbo barbare bruligataj en maŝinoj k fornoj. Por ricevi energion, utiligu akvon, tajdon, varmon de suno, internan varmon de tero, venton, kiel eble plej rapide elektrigu industrion k transporton. El tre valoraj nafto k karbo oni devas produkti pli karajn k necesajn ĥemiaĵojn.

[1] Mondprovizo je karbo k nafto estas 7400 bilionoj k 7700 bilionoj da milkilogramoj. Mondprovizo je akvoenergio egalas nur 720 milionojn da ĉevalpovoj, sed ĝi estas neelĉerpebla, ĉar pro vaporiĝo ĝia cirkulado inter montoj k maro estas senĉesa.

6. 2. Nutromaniero de l' homo en diversaj epokoj ne estis sama k tute dependis de l' ekonomia stato. Kiam fruktoj k nuksoj estis multaj k ĉieaj, la homo nutris sin per ili. Poste la homo nutris sin per ĉaso. Kiam sovaĝaj bestoj fariĝis malmultaj, la homo komencis terkulturi k des pli intense, ju plimultiĝis la homo. Sed la tero pli k pli senfruktiĝas, la kamplaboro streĉiĝas k plugareo vastiĝas. Unu hektaro da tritiko ĉiujare prenas el tero 70 gramomilojn da azoto, kiu neniam plenkvante revenas en la teron. La tero bezonas refruktiĝon per ricevo de azotaĵoj (precipe salpetro KNO^3). Sed mondprovizo je azotaĵoj rapide elĉerpiĝas pro neracia kapitalista ekspluato, pro barbara malŝparo de azotriĉaĵoj por militaj celoj (fabrikado de eksplodaĵoj en kolosa kvanto). Bruloj liberigas en aeron egan kvanton da azoto, kiu revenas en teron nur en eta kvanto (k nur pro okaza efiko de atmosfera elektro). Krome — la bruloj k elspiroj de homoj k bestoj amasigas en atmosfero karbacidan gason CO^2, kiu minacas post ĉ. 500 jaroj fari ĝin danĝera por homekzisto, se nuna elcento da hommultiĝo (0,66) ne ŝanĝiĝos. Sole dum lasta jarcento la loĝantaro de l' tero duobliĝis. Do post 500 jaroj la loĝantaro egalos ĉ. 60 bilionojn.

Nia urĝa tasko estas zorgante pri estonto raciigi la mondmastrumon, kontroli la industrion de azotaĵoj k progresigi karbonĥemion, por ke oni povu inventi facilan rimedon de nutraĵricevo el atmosferaj azoto k karbacido. Sen tio la homaron minacas baldaŭa veno de nutrokrizo.

6. 3. Rilate al produktado la homo devas esti rigardata kiel maŝino. Tial batalo kontraŭ hommultiĝo tute similas batalon kontraŭ multigo k perfektigo de maŝinoj. Sociaj malfeliĉoj venas ne pro troa hommultiĝo, sed pro senracie aranĝita produktado, bazanta sin sur kolosaj rezervaj armeoj el senlaboruloj. Tamen homo ne devas imiti senkonsciajn bestojn, kiuj multiĝas blindinstinkte, naskas malbone heredantan sennombran idaron suferantan dum tuta sia vivo k fatale naskantan samajn suferulojn. Hommultiĝo devas fariĝi konscie celanta perfektigon de homraso per nasko k flego de elekte

epoko de Mahometo liaj praavoj tre ŝatis tiun manĝaĵon, sed pro epidemio estis devigataj kontraŭagi per malpermeso konsumi porkviandan nutraĵon.

La arabo ne trinkas alkoholon. Mahometo malpermesis tion al ili, ĉar li vidis, ke ili ebriiĝis okaze de ĉiu festo k donis priplorindan spektaklon. La buĉatajn bestojn la arabo dediĉas al dio, turnante ilian kapon orienten. La oferita besto estas ĉiam manĝata de la familio . . .

La arabo observas la kulton al kadavroj. Oni portas manĝaĵojn sur la tombojn de l' mortintoj, precipe vendrede. La ŝakaloj aŭ, pli ofte, la marabutoj ekkaptas tiujn manĝaĵojn destinitajn por la animoj de l' transmondanoj. La araboj ne estas enĉerkigataj, oni transportas ilin tombejen putrantaj, en simpla tolo.

La bapto konsistas el cirkumcido. Multaj tiel tranĉitaj infanoj malsaniĝas pro la operacio. La popolo estas multnaska. Multaj infanoj mortas junaj, k la restantaj konsistigas elekton. Ĉiuokaze ne necesas ruinigi ilian sanon sub religia preteksto. — La bona kredulo lavas sin antaŭ ĉiu preĝo. Principe bona afero, sed en la praktiko senefika, ĉar la arabo lavas sin per etaj porcioj da akvo entenitaj en malgranda lada ujo. Nur riĉaj araboj banas sin en vaporbanejo unu fojon semajne.

La fastotempo

La Korano ordonas la fastadon. Kvankam la plimulto de l' indiĝenoj ne konas eĉ plej etan tekston el tiu libro, ili fastas pro kutimo. Tiu fasto daŭranta unu monaton estas krimo je fiziologia vidpunkto, precipe por laboristoj, kiuj ofte pro severa fastado serioze malsaniĝas. La rapide englutata nutraĵo en la permesita manĝotempo de 18-a horo ĝis noktomezo ne utilas al la stomako kiel regule absorbata nutraĵo. Se la vivbezonego ne devigus la laboristojn labori, ili certe forlasus dum tiu monato la laborejon. Fakte multaj forrestas el la laborejoj, ĉu ĉar ili vere estas malsanaj aŭ trolacigitaj, ĉu por resti tutan tagon preĝantaj . . .

Estas malfacile komprenigi al la amaso analfabeta la stulton de tia praktikado. La loĝantaro suferas malvigle, beste, stulte, ne sciante kial, simple pro timo je reciprokaj venĝoj en okazo de neobeoj. Estas iom simile kiel la konduto de civitano, kiu malbenas la militon, sed nenion riskas fari kontraŭ la militaj entreprenoj. Ĉie la senenergieco, kiel konsekvenco de plena manko da eduko al pensado. La malbonfaroj de l' fastotempo estas grandegaj. La marabutoj profitas el tiu ĉi fizika malfortiĝo por fari novajn trompagojn.

La pilgrimado al Meko

Tiu ĉi pilgrimado estas la plej abomena afero imagebla. Kiuj revenas de tie, gardas en la koro impreson neestingeblan de teruro. Sed la organizantoj ĉirkaŭas tiun inferon per la mistero k mistiko, tiel ke eĉ kleruloj envias tiujn, kiuj plenumis la vojaĝon.

Vajnman citas en sia broŝuro, el kiu ni kompiltradukas ĉi tiun resumon[1], partojn el la raporto de pilgrimanto, kiu partoprenis en j. 1928 la faman vojaĝon al la sankta urbo Meko, sur malnova, malpurega greka ŝipo, sub ĉielo kvazaŭ el plumbo, 20 ĝis 30 pasaĝeroj en unu ĉambreto sur planko malseka, sen vojaĝovestoj, kapo kaj piedoj nudaj — dumnokte anstataŭ dormo la akregaj krioj de l' preĝoplenumantoj. En la havenurbo Djeda ili atendas kun 9500 aliaj pilgrimantoj, javanoj, hindoj, somalianoj, sudananoj, persoj, egiptoj, turkoj, albanoj, sirianoj k. a. preskaŭ unu semajnon, interpremitaj en malvastaj strataĉoj. La prezoj por fruktoj, pano, eĉ akvo estas altegaj. Poste la karavano da pilgrimantoj en nekredeblaj penegoj k suferoj trapasas la dezerton de Hedĵas. Multaj mortas dum tiu vojaĝo; tamen estas notinde, ke neniu foriris malsana de l' hejmo. En Meko mem kunvenas 300 mil pilgrimantoj. La tuta urbo, stratoj k placoj transformiĝis en grandan dormejon, manĝejon k deponejon samtempe. Sepfoje ĉiuj iras en kompaktaj amasoj al la ĉeftemplo (*Hamam*). Multaj maljunuloj faras la vojaĝon por morti tie sur sankta tero.

* * *


En tiaj kondiĉoj nenia civilizo estos ebla. Tie oni nutras la cerbojn per superstiĉ-ideoj, praavaj kredoj k terura fanatiko sub la trompa preteksto de l' respekto al la kutimo k tradicio. Kun la pereiga influo de iuj marabutoj ĉe l' horizonto aperas terura danĝero.

[1] Leono Vajnman (Weinmann), ano de la liberpensula ligo en Alĝero: *Sub la Jugo de l' Islamo.*

---

hereditaj idoj. Ju pli multe, des pli bone, ĉar per la homo senviva materio transformiĝas en pli k pli perfektan k alte sentantan organismaron.

6. 4. Akceli normigon (samgrandigon k en konformaj okazoj samformigon) de ĉiuj amase produktataj objektoj (partoj de maŝinoj, ŝraŭboj, lampoj, seĝoj, litoj, gazetoj ktp.), por ke ili estu egalfacile uzataj k aplikataj de ĉiuj homoj en ĉiuj landoj de la mondo. Kiel ekzemplo jen estas 3 tiaj normojformatoj por paperaĵoj (libroj, leterpapero, kartoj, albumoj, markoj ktp.): A-formato (1189×841 mm), B-formato (1000 ×1414) k C-formato (917×1297). Bazo de la formatoj estas kvaranguloj, kies longoj k larĝoj rilatas kiel 1,414:1 (kiel diagonalo al latero de ajna kvadrato). Areo de A-kvarangulo = 1 kv. m., B-kvarangulo = 1,414 kv. m., C-kvarangulo = 1,19 kv. m. Ĉiuj ĉi bazaj kvaranguloj por formi novajn formatojn povas esti 13-foje laŭlarĝe duonigataj. El la unua duonigo rezultas formato A 1 (841×594), el la dua la formato A 2 (594×420), el la tria formato A 3 (420×297) ktp. Same pri formatoj B k C.



6. 5. Ĉiel akcelu kooperadon, en industrio same kiel en komerco k agrokulturo. Kiam venos la horo, la kooperigon tre faciligos pluan ĝeneralan kooperigon, t. e. socialismon. Ĉiel akcelu progreson de Tekniko, kiu povas estiĝi nur per *individua* iniciato k inventemo. Malkompreniĝo k konflikto prodialektikaj inter kolektivo k individuo iĝos tragedio de estonto. Tial atentegu, por ke ili (estante neekspluatemaj) ne estu katenataj de natura malmovemo k pezo de kolektivo. Ĉiel akcelu akordon inter individuo k kolektivo por pleja bono de ambaŭ. Tekniko estas plej granda revoluciulo, kiu difinas sorton de l' Homaro. Tekniko estas nia Savonto k Dio de l' Novo. Sed nuna Tekniko estas nur ĝermo de tiu, kiun bezonas Novo. Homaro apenaŭ venis al sojlo de civilizo. Mondproletaro devas malfermi pordon al ĝi.

7. 1. Uzi ĉiujn rimedojn, por ke naciaj lernolibroj havu sennaciecan spiriton. Unua lernolibro pli profunde influas infanon, ol 100 poste legitaj libregoj.

7. 2. Praktike eduki sennaciismon al gejunularo, igante junulojn de diversaj landoj senpere rilatiĝi per korespondo en sennacia lingvo, per interŝanĝo de diversaj interesaj por ili objektoj, fotoj ktp. Sole la korespondo donas en ĉi tiu direkto multe pli, ol seka perlibra prediko k sugesto. Plej bone eduki povas reciproka interŝanĝo de gejunuloj el malsamlandaj familioj, lernejoj aŭ fabrikoj por libertempo. La elspezoj estos bezonaj nur por vojaĝigi la junulojn de lando al lando. Veninte "fremdlandan" familion (lernejon aŭ fabrikon) la junulo nur anstataŭos ties anon same vivtenotan en reciproka lando.

(Daŭrigota)

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

En ĉiuj kunvenoj k institucioj la homoj denaske malbonintencaj havos la plimulton, k eble naskiĝos naciismo pli abomena, pli danĝera ankoraŭ ol la faŝismo . . . *Kompiltradukis SAT-ano 55.*

SAT vastigas sian agadkampon eldonante la n o v a n gazeton SAT-anoj kaj precipe geinstruistoj, vigle partoprenu tiun iniciaton abonante senprokraste al

SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

VILAĜA KOMUNUMBALOTO EN BULGARIO

Je 16. februaro okazis en Bulgario baloto en vilaĝaj komunumoj. Kiel ĉiam la faŝista registaro deklaris, ke la baloto estas libera, ke ĉiuj partioj havas la rajton iri en vilaĝojn k fari propagandon. Tamen esceptita estis la Laborista partio, kies aktivuloj ne havis liberan agit-rajton. Preskaŭ ĉiuj burĝaj politikaj partioj eluzis la okazon por agiti en la vilaĝoj, k kompreneble la reganta k aliaj burĝaj partioj estis nedivideblaj fratoj.

Semajnon antaŭ la baloto la registaro kolektis ankoraŭ ĉiujn faŝistojn kaŝajn k malkaŝajn, policanojn ktp., por dissendi ilin en la vilaĝojn por preparo de l' baloto. Oni plenumis la donitan taskon. Preskaŭ en ĉiuj burĝaj gazetoj aperis kelkajn tagojn antaŭ la baloto plendoj, ke alipartianoj estas batataj de faŝistaj bandoj ebriiĝintaj, ke liberaj kunvenoj ne estas fareblaj. Multaj opoziciuloj estis arestataj. Tamen la ministroprezidanto deklaris tute senhonte, ke la balotado okazis sen incidento k teroro ne estis. La Laborista partio povis nenion skribi pri la elekto.

Du faktoj ilustru la situacion: Iu burĝa gazeto (nomo nelegebla pro la fuŝa skribmaniero de l' aŭtoro! — Red.) enpresis du telegramojn de burĝa deputito, bona konato de l' ministroprezidanto, kandidato por la registara listo en regiono Pozorĝiva. Li skribas: "Mi protestas kontraŭ vandalaj agoj de l' regiona policestro k deputitoj Golov k T. Ĥristov. Kun aŭtomobilo aĉetita por aliaj celoj per komunuma mono, ili tage k nokte traveturas de vilaĝo al vilaĝo k terorigas la opozicion. De tri tagoj agentoj ĉirkaŭas presejojn por timigi k forpeli la homojn k ne presigi balotlistojn. Balotkartoj ankoraŭ ne estas disdonitaj.

Kaj je 16. febr.: "La tuta regiono estas okupita de policanoj el Sofio k Plovdiv. Hieraŭ posttagmeze komenciĝis arestoj. Vespere mi vidis grupojn da vilaĝanoj kondukataj en policoficejon . . ." Tion konstatis la burĝa deputito Urtov.

Dum la balottago mem la vilaĝanoj ne tolerante plu la fiagojn policanajn, atakis la agitantojn faŝistajn per ŝtonoj k bastonoj k mortigis ilin. Same oni mortigis policanon ĉe la komunuma ejo.

20 vilaĝanoj en Ĉamŝidimovo pro timo je batoj k turmentado forkuris el la vilaĝo. Dum la tuta nokto faŝistaj bandoj pafis tra la vilaĝo. Oni pafis ĉirkaŭ la domo de instruisto. Eĉ estis ĵetata bombo, kiu mortigis unu vilaĝanon. La instruisto estis vera militkaptito.

Laŭ tiuj ĉi faktoj la K-doj povas juĝi, kia "balotlibero" regis en tiu tago.

Bulgariano.



Masarik 80-jara

Masarik, festis la 7. marto la 80-jaran datrevenon de sia naskiĝo. Li estas filo de malriĉulo, kiu servis kiel veturigisto en farmo de la aŭstriimperiestraj bienoj. La juna forĝistlernanto, dank' al sia inteligento, sukcesis bonŝance viziti liceon k universitaton, fariĝis profesoro k instruis filozofion. Ĉiujn fortojn siajn li turnis al la nacia sendependigo de Bohemio. Ĝi estis lia vivtasko, k baldaŭ li troviĝis en la centro de l' konstanta, senlaca porĉeĥa agado. Kiam dum la milito li estis ĉe ĉiuj kunligitaj nacioj la advokato por la ĉeĥa sendependeco, prezidanto ĉe la formiĝo de ĉeĥa armeo, li deklaris sin en memorskribo prezentita al Ŭilzn (Wilson) kontraŭ ĉiu milita interveno kontraŭ la bolŝevika Rusio. Ok tagojn post la proklamo de l' Ĉeĥoslovaka Respubliko, kiam li fariĝis prezidanto ĝia, estis lia unua zorgo kontraŭstari al venĝa subprem-ondo kontraŭ la germana loĝantaro.



Li estas idealista filozofo k eĉ deisto (diano). Tiel li verkis ampleksan volumon (antaŭ preskaŭ 30 jaroj) kontraŭ la fundamentaj principoj de l' marksismo. Tamen li apogis la agadon de l' socialistoj por la okhora labortago per sciencaj demonstracioj.

Nova libro
J. Stalin



LA DECIDA JARO

(Al la 12-a datreveno de Oktobra revolucio)

Jus aperis en la serio "Komunista Biblioteko". Prezo 15 kop. (0.30 mk. g.)

Mendu ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1 Leipzig O 27. — Sovetianoj ĉe CK SEU

DISKUTEJO

"Problemoj de nia vidpunkto"

En n-o 281 K-do Gross (1899) respondas al mia propono el n-o 263. Temis pri tio, aldoni por eviti miskomprenojn al ĉiu subskribo ĉe artikoloj presataj en "S-ulo" la indikon, laŭ kiu vidpunkto ili estas verkitaj. K-do G. pensas, ke oni devas "raporti objektive" k "ne laŭ la tendenco de sia mondkoncepto". Li citas ekzemplon: du diversaj raportoj pri labortempo en Germanio. Estas kompreneble, ke neniu mondkoncepto (escepte religia, kiu ne baziĝas sur faktoj) pravigas al inventado de faktoj. Tamen raporti pri iu ajn fakto ne estas la samo, kio klarigi ilin. Ĉe simplaj raportoj pri okazintaĵoj, ĉe statistikaj nombroj — citado de l' vidpunkto nenecesas. Sed se oni serĉas pri la kialoj de iu okazintaĵo, ĉio ŝanĝiĝas. K-do G. kontraŭstarigas "mondkonceptan" k objektivan vidpunkton. Objektive oni povas nur noti faktojn — tamen ne ilin kompreni. Ekzemplo: la granda milito estis fakto nedisputebla — pri ĝiaj kialoj aliel pensas burĝaj k proletaj, marksistaj historiistoj; same estas pri ĉiu fakto. Se do ni legas raporton, ni devas scii ne nur, ke io vere okazis (tion ni povas nur kredi al raportanto), tamen *laŭ kiu vidpunkto* tio estis observata. Du homoj povas observi la samon k vidi tion aliel. Ĉe difinita okula malsano, nomata "daltonismo", oni ne diferencigas inter si kelkajn kolorojn. La saman koloron iu homo vidas kiel ruĝan, alia kiel verdan; unu k la alia objektive raportos pri sia observo. Se tamen unu ne notos: "laŭ daltonista vidpunkto, tiu aĵo estas verda" ni neniam evitos miskomprenojn. K-do G. subskribas sian rimarkon: "Verkita laŭ SAT-ana vidpunkto". Ĉu vere SAT-anio batalas kontraŭ "mondkonceptoj"? . . . Laŭ SAT-ana vidpunkto oni povas skribi pri lab. esp. movado, pri celoj de nia lingvo, pri neŭtrala esp. movado, pri signifo de l' proleta interkompreno k. s. En politikaj, sociaj demandoj SAT-anio ne havas unuecan aspekton. Mi trovas la enkondukon de mia propono grava. En la sama n-o 281 mi mem akceptis mian proponon, subskribante artikolon pri pola imperialismo: "laŭ komunista vidpunkto". Mia nuna respondo celas ion, kun kio devas konsenti ĉiu homo, komprenanta la rolon de l' proleta klerigado, k tial mi prave povas subskribi.

Laŭ SAT-ana vidpunkto *Leono (14 839).*

Esperanto-Servo

N-o 25 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 20. Marto 1930

EL RUMANIO

Strikrompantoj mortbatas strikanton — polico atakas funebran manifestacion

174 (Esp.-Servo.) La gelaboristoj de fer-industria fabriko Semaitre en urbo Bukarest (ĉefurbo) strikas jam depost 10-an de februaro, pro malaltigitaj salajroj k viv-malboniĝo. La dekan tagon de l' striko antaŭ la fabriko prezentiĝis multaj strikrompantoj. Alian tagon la strikrompantoj eniris la fabrikon por labori. Unu el la strikantaj K-doj eniris la laborejon por konvinki la malkonsciajn strikrompantojn. Li ankaŭ sukcesis haltigi kelkajn maŝinojn, kiam kelkiuj ekbatis lin, tiel, ke post kelkaj minutoj li mortis. La trian tagon post tiu okazintaĵo la laboristaro de la urbo estis alvokita, partopreni la entombigon. La funebra manifestacio moviĝis sub ruĝaj standardoj. Subite aperis ĝendarmoj k soldataro, kiuj atakis la amason; 12 laboristojn k 3 virinojn oni arestis; la policistaro ankaŭ konfiskis la ruĝan standardon. *Role.*

EL GERMANIO

Terura familiotragedio en Chemnitz

175 (Esp.-Servo.) La 28. 2. mortigis sin per lumgaso 35-jara laborista edzino en sia loĝejo en urbo Chemnitz (Saksio) kune kun 6 el siaj infanoj. Ĉiuj 7 familianoj mortaj estis trovataj de la 16-jara filino, kiam ŝi je 21-a horo hejmenvenis. La patro de la familio estas militinvalido k nun senlabora. Li ricevis sian almozan renton k ebriiĝis dum tiu ĉi tago. La aĝoj de la mortaj infanoj: knabinoj havis 12, 6 k 3 jarojn; knaboj havis 10 k 8 jarojn k unu nur 4 monatojn. — Ĉefan kulpon pro ĉi tia tragedio portas la tute malsufiĉa mon-subvencio por milit-invalidoj. Al religiuloj mi demandas, kie restas la dia helpo por tiuj familioj??

G. N. (8130), Göppersdorf.

EL POLIO

Tro frue..., necesejoj —

176 (Esp.-Servo.) En Kielce-a vojevodio (regiono?) oni rakontas pri karakteriza interparolado de la starosto (prefekto) kun kamparanoj de vilaĝo. La eksministro por internaj aferoj, s-ro Skladkovski vizitis siatempe kelkiujn vilaĝojn, kie li ordonis, en daŭro de monato konstrui tiom k tiom da necesejoj. Plenumon de l' ordono devis priatenti s-ro starosto, kiu post forpaso de monato efektive konstatis, ke la necesejoj estas konstruitaj. "Nun konvinkiĝu mem" — diris la starosto al kolektiĝintaj kamparanoj — "nun vi ne estas sovaĝa Azio, sed civilizita vilaĝo. Nu, ĉu malbona estas s-ro ministro?" Unu el maljunaj kamparanoj post kelkminuta pripenso rediris: "Ne, li estas bona, sed vi tro frue alvenigis lin al ni, s-ro starosto". "Kial tro frue?" "Ĉar antaŭe estus necese alvenigi tian ministron, kiu donu ion por manĝo, k poste la tian, kiu donu al ni kie ni povu..." *C. G.*

Kiom da homoj en Polio malsatas?

177 (Esp.-Servo.) Laŭ sufiĉe ekzakta elkalkulo en nuna Polio: 6 milionoj da homoj nutras sin bone; 16 milionoj konsumas nur tiom, kiom necesas por vivi; 8 milionoj da homoj malsatas... *C. G.*

Analfabeteco en Polio k aliaj landoj

178 (Esp.-Servo.) En Polio estas pli ol 50% da analfabetuloj. La vilaĝo havas relative pli ol urbo. En Varsovio ekz. estas 16,96% da analfabetuloj, en aliaj urboj de la lando estas pli aŭ iom malpli ol en Varsovio. Laŭ elkalkulo de Statistik-Oficejo en Hago estas da analfabetuloj en: Praha 0,67%, Vieno 2,04%, Parizo 3,36%, Budapesto 4,67%, Romo 10,90%, Leningrado 13,80%, Moskvo 22,42%, Bukaresto 25,57%, Lodz (Polio) 31,91%, Kiev (Ukrainio) 44,62% ktp. Do plej malmulte da analfabetuloj havas Praha. Sed mi aldonu, ke oni povas legi, skribi k fini universitaton — sed esti socifripono. Ekzemplon? La tuta nuntempa burĝaro... *C. G.*

EL SOVETIO

Oni batalas kontraŭ analfabeteco

179 (Esp.-Servo.) Kiam vi alproksimiĝas la teritoron de nia grandega fabriko "Proletarka" (en urbo Tver), vi povas vidi okulfrapajn afiŝojn, kiuj alvokas preterirantajn homojn likvidi sian analfabetecon. Tiaj afiŝoj kun diversaj tekstoj pli-multiĝas en la fabrika korto. La internaj muroj de kluboj k ruĝ-anguletoj ankaŭ estas ornamitaj per afiŝoj kun alvokoj tiudirektaj. Sur ili vi ofte povas legi citaĵojn el la verkaro de K-do Lenin. Je unu muro estas murgazetoj el lernejoj, en kiuj oni jam likvidas sian analfabetecon. Je alia muro vi povas vidi ekspozicion de analfabetuloj, kiuj montras siajn atingojn post unu monato k 15 tagoj. En tiu ĉi ĉambro vi konvinkiĝas, ke la laboro por likvidi analfabetecon, en la fabriko "Proletarka" estas bona. Laŭ statistikaj kartoj el 1030 analfabetuloj oni jam ekkaptis por lernado 85%, laŭ izolitaj kazernoj ĝis 96%. Tiuj ĉi rezultoj estas atingitaj post bona mobilizado de la socio k ĝusta utiligo de la fortoj. Urbo Tver estas dividita laŭ regionoj, en ĉiu regiono estas stabo. De regionstabo iras fadenoj al la aliaj organizoj: al la regiona komitato de la partio k al la fabrikaj komitatoj, k tra ili al fabrikoj k kazernoj. En ĉiu kazerno estas elektita rajtigito kun helpantoj, kiuj respondas por likvido de analfabeteco en ĉiuj etaĝoj. Tiuj ĉi respondecaj K-doj de kazernoj estas unuigitaj en kazernaj komitatoj. Instruistoj kontrolas la viziton, k kiam lernanto aŭ lernantino kelkfoje ne vizitis lekciojn, ili informas pri tio la stabon. Specialaj helpantoj ĉe la stabo havas la taskon, tuj post tia sciigo flanke de instruisto, esplori la kialon de foresto k averti la lernantojn por daŭrigi la lernadon. Kiam lernanto aŭ lernantino estas malsana, sed povas sin okupi hejme, oni sendas instruiston, kiu instruas ilin en la hejmo por eviti, ke lernanto aŭ lernantino postrestu la aliajn gelernantojn. Ankaŭ ĉiuj gelernantoj de mezaj k altaj lernejoj estas mobilizitaj por tiu laboro. La instruistoj ne preterlasas iun lekcion k la vizitado estas 95—98% el la gelernantoj. Oni eldonas specialan literaturon por analfabetuloj, kiun disdonas al la gelernantoj legosciaj junlaboristoj aŭ infanoj, kio multe efikas. Por la tuta urbo ekzistas centra komisiono por likvido de analfabeteco, kies decidoj estas devigaj por ĉiuj. La komisiono havas help-lernejojn, en kiuj estas grupo da instruistoj, por povi laŭnecese ŝanĝi aŭ anstataŭi instruistojn en okazo de fiasko aŭ forveturo de instruisto el tiu aŭ alia lernejo. Do la lernado funkcias seninterrompe. Komitato por politika klerigo ankaŭ ne malfruiĝas en la laboro. Per instruistoj k inspektoroj ĝi havas interligon kun regionaj staboj, kio garantias la sukcesojn en la laboro k iom post iom forigas ĉiujn difektojn... *Filippova (5281), Tver.*

Ni estis kamplaboristoj de bienuloj

180 (Esp.-Servo.) Antaŭ nelonge revenis Sovetion grupo de iamaj svedoj (21 personoj), kiuj pasintsomere elmigris Svedion. Post sia reveno Sovetion la iamaj svedoj rakontis: "Ni vivis en Svedio nun dum 5 monatoj k konvinkiĝis, ke en burĝa lando la vivo de laboruloj estas tre malbona, ke patrio de ĉiuj laboruloj estas nur Sovetlando. Kiam ni vivis en Sovetio, nia pastro konvinkadis nin, ke en Svedio por ni estos pli bone. Sed kiam ni trafis Svedion, oni faris nin kiel kamplaboristoj de bienuloj." — La svedoj revenintaj Sovetion, ricevis siajn malnovajn kampojn en kolonio de iamaj svedoj. *6478, Rostov (Don).*

EL ARGENTINO

Pulm-malsano en Argentino

181 (Esp.-Servo.) En Argentino laŭ nova statistiko po jaro mortas 15 000 da homoj pro pulm-malsano, k nun estas 150 000 pulm-malsanuloj.

13 827, Montevideo.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Rudolph-Herrmann-Str. 7, ptr. r. (Germ.)

SPORTO

Tiu vorto egalsonanta tra multegaj lingvoj estas tiom bone komprenata, ke laŭ provizora konsidero ĉiu miskomprenanto estas mokridinda. Ĉar ĝi estas unu el la plej ofte uzataj, plej bone konataj, ĉiu scias traduki la vorton en sian lingvon k inverse. Sed se oni petus cent malsam- aŭ samlingvajn homojn, konkretigi la sencon de la vorto, doni tutsimple respondojn al la demando: kio estas sporto? tiam certege oni povus ekscii cent malsamajn solvojn de la enigmo, dum pluraj dekoj tute ne scius respondi aŭ dirus: Sporto estas ĉio k nenio! Strange! Sed samstrangaj estas ankaŭ la "sportspecoj" konstateblaj ĉe iuj homoj. Ekz. mia patro (unu el la "malnovuloj") diradas emfaze: Laborado estas mia sporto! Dum kongreso mi demandas junulon migrule vestitan: Ĉu vi estas sportulo? Respondo: Nu, mi estas esperantisto — jen mia sporto! Kolegon junan mi vidas staranta kun granda orbrila insigno sur la ĵaketo. Proksimiĝante mi ekkonas, ke du grandaj pipoj formas ĝin. Demando duba: Vi, laboristo — en fumklubo? Respondo fiera, konvinka: Jes! Sporto mia kara. Tion vi ne komprenas! Kaj mi, kiu arogas nomi min konvinkita laborista sportulo, efektive kapskuas pri mia aŭ ilia stulto — k petas vin, kara leganto, formi normon pri sporto el supraj ekzemploj.

Tamen estu honeste dirata, ke plejparte sub termino "sporto" oni komprenas ian korpan okupadon eksterprofesian. Sed — jam ne senescepte, ĉar ekzistas profesisportistoj. Plie la teknika progreso kreis sportojn permotorajn, kiuj nur okupas la nervojn. Ĉiuspecaj k -tendencaj partioj, sindikatoj, eklezioj k kulturorganizoj klopodas altiri junularon per sporto akceptita en iliajn programojn. Samaj organizoj ĝemas pri la indiferento de la juna generacio al la organizaj idealoj. Laŭ unuanima opinio nur kulpas la sporto. Sporto pliigas laborpovon! diras la fabrikistoj k instalas sportgrupojn industriajn aŭ subvencias sporton ("neŭtralan"). Samaj krias, ke sporto vane ekspluatas laborfortojn, irigas laboristojn jam lacigitaj en laborejojn, indiferentigas ilin pri produktodevoj k vekas estremon en ili. Proletoj aprobas sporton por hardi jungeneracion por la vivbatalo k malbenas ĝin, ĉar ĝi forgesigas la ruiniĝon k subpremiĝon de l' klaso. Ĉiuj sanigistoj k kuracistoj rekomendas ĉe plej multaj malsanoj k suferoj la universalkuracilon "sporto" — k malpermesas ĝin ĉe iuj aŭ ĉiuj fizikaj aŭ psikaj funkcioĝenoj. Jen la dilemo! Ju pli oni cerbumas, des pli ĝi ĥaosiĝas. Helpu! Ho senantaŭjuĝa prudento de l' "homo sapiens"!

Eĉ ĉi-paĝe mi ne por- aŭ kontraŭparolu, sed simple klopodu klasigi sporton laŭ rolo senspeca k sentendenca por la aplikantoj. Ampleksege ĝi servas kiel tempopasigilo. Samkiel dum liberaj horoj iuj nepre mallaboras, dormas, vagas, legas, amindumas, diboĉas ktp., multegaj aliaj praktikas sian sportspecon. Oftege oni aŭdas la plendon: Se mi nur scius kion fari pro enuo, se nur baldaŭ estus sporthoroj! Tiun grupon oni ekkonas laŭ jenaj kriterioj: La anoj sociemaj, gajemaj ne estas ambiciaj, ne grave interesiĝas pri sporttekniko k tute ne deziras ŝarĝi sin per scioj pri socia aŭ kultura sportideologioj. Help- aŭ gvidoficojn ili certe malakceptas, ĉar ne per devoj, sed per ĝuoj ili deziras pasigi la tempon. Dua grupo sportas pro memkontentigo. En ili ripozas energioj ne aplikeblaj pli facile ol peni atingi altrezultojn en ia sporto. Ili daŭrigas nutri sian ambicion ĝis plejega rekordemo k alcelas esti favoratoj, t. n. "kanonoj". Ili malofte estas helpemaj, sed laŭ praktika rango ofte konsideras sin taŭgaj gvidantoj. Ilia rezultoj estas persona rikolto. Nur malofte ili fariĝas "unuiĝpatriotoj" aŭ metas sian ambicion en servon de asocio, ĝis ne plu estos samkvalitaj konkurantoj. Tiam: "estas nenio plu" k ili iras en alian klubon. Kulturideoj de sporto estas fremdaj al ili. Jen kial oftege la plej altkvalitaj sportuloj estas indiferentaj al ĉia pensiga kulturprojekto. — Jenaj du grupoj volonte venas amase, kun amikoj, sed malaperas senpripense, se ne plu estas amikoj, la sportaĵoj enuigas aŭ ial ne plu kontentigas k instigas ilin.

Pli atentinda estas tria grupo. Unuope ĝiaj anoj venas k preskaŭ sen propagando. Preskaŭ nerimarkate ili klopodas fariĝi lertaj sportuloj k komprenantoj por atingotaj sportceloj. Ili baldaŭ vidigas per sinteno, ke la sporto ne restis por ili ludilo aŭ tempopasigilo, sed fariĝis idealo. Ili eltenas kritikojn, akceptas ĉian helpon, helpas eĉ laŭpove mem k metas sin en servon de organizo ne havante grandajn postulojn al ĝi. Jen la plej bona tipo de lojalaj nursportuloj.

Sekvas nur unu, sed plej dezirata grupo: Tia, kiu enhavas ĉiujn virtojn k ecojn sportkoncernajn. Ties anoj ne nur sportas por sporti aŭ akceli sporton, sed scias, ke perprofesia ruinigo aŭ misfigurigo fizika necesigas korpekzercojn ekvilibrigajn... Ankaŭ, ke heredaj aŭ promalsanaj patalogiaĵoj k neproporciaĵoj fizikaj neprigas ĝusteformi la korpon per koncernaj okupadoj sub konstanta konsidero de novaj, senantaŭjuĝaj anatomiscienco, etiko k moralo. Do ili praktikas korpokulturon. Ĉar evidente ĉio ĉi jam necesigas pensadon pri celoj de sporto k korpo, la adeptoj certe plupensos, scias aprobi aŭ malaprobi tiun aŭ alian sportspecon por si k aliaj, estas eble iomgradaj sanitaruloj, scias kunligi la privatan idearon kun la socia, homara k certe plejparte ankaŭ kulturas la menson same kiel la korpon. Jen la idealistoj, kiujn ni bezonas! Ĉion por la organizo ĝis la limo de tempo k fortoj! Devizo: "Por la popolo ni agadas, dum ludi ni ŝajnas".

Kompreneble ne ĉiam la grupoj estas tiom bone ekkoneblaj. Eble iuloke estas pli aŭ malpli da grupoj aŭ nuancoj. Sed vidante la kvazaŭan ĥaoson da karakteroj, oni ne bezonas miri, ke sama rimedo povas esti sanigilo k mortigilo, ke iu idealo, povas savi k pereigi, ke amiko k malamiko estas sama persono ktp. Ĉu ne samtial la homaro ankoraŭ ne estas "granda rondo familia"? Se ĉiuj samopinius, ĉu necesus propagandi? Ĉu ni ne ĉiuj parolus esperanton aŭ ian homaran lingvon? Mi finu k konstatu jenon: Samkiel la universo estas unuo malgraŭ sia multvario, dependa inter si, tiel la homoj tendencu unuiĝi, formi veran socion. Nepre atingonte tiun ĉi celon, ni sportuloj estu vojpreparantoj! Ni fosu nian sulkon! Ĉar jam "tra densa mallumo briletas la celo, al kiu kuraĝe ni iras". "Kiel ruĝflama stelo en postvenka helo al ni la direkton ĝi diras!" *5320, Görlitz.*

NIA UNUA SKIADO NUNVINTRE

Ne brilis la suno, ne brilis la neĝo, sed estis frosta k nebula vetero matena. Ni 7 geesperantistoj kolektiĝis ĉe klubo je nomo de l' jaro 1905. Preninte skiojn, ni ekiris al Volgo piede k poste ni surskie veturis en postvolgan regionon.

Tagmeze la vetero estis pliboniĝinta k ni tuttempe ridadis k paroladis. Postvolge ni demontiĝis surskie, multfoje faladis k ree demontiĝis.

Ĉirkaŭ la dua horo niaj K-dinoj ekdeziris reveni hejmen, ĉar ili malvarmiĝis k laciĝis. Ni akompanis ilin ĝis Volgo k poste revenis por skiadi. Post kelkaj minutoj unu K-do volis manĝi k ankaŭ hejmeniris. Ni restis duope ... "Nu amiko, kien ni direktiĝos?" demandis unu. "Veturu lokon, al kiu ni veturis pasintjare" respondis la alia. "Nu, veturu."

La vojo en krutvaleto arboza estas belega. Ni estis revenintaj per alia vojo

TRA ESPERANTIO

EL LA PRAKTIKA VIVO

(Kiel respondo al K-dino Krupskaja)

I

Antaŭ kelka tempo germana komercisto sidis en la manĝvagono de ekspresa trajno al Konstantinoplo. Kun granda intereso li observis, kiel la kelnero klopodis interkomprenigi sin kun alia pasaĝero. La kelnero tiun alparolis unue per rusa lingvo. La alia faris gestojn de nekompreno. Poste la kelnero sinsekve provis la ĉeĥan, polan, rumanan, hungaran, bulgaran, grekan, serban k laste la turkan lingvojn. Sed la alia ne komprenis. La germana komercisto sin levis, alpaŝis al la du k proponis en turka lingvo sian helpemon al la kelnero. Samtempe li aldonis bonintencan konsilon: “Sinjoro kelnero, vi provis per *naŭ* diversaj lingvoj, — sen sukceso. Do — vi klare vidas, ke vi nepre devos lerni ankoraŭ unu lingvon el okcidenta Eŭropo, — unu aŭ el la romana aŭ ĝermana lingvogrupoj. Nur tiam vi povos vojaĝi tra la tuta mondo k ĉie oni komprenos vin!“

La kelnero ne sciis ion diri kontraŭ tiu ĉi parolo. Li sole ĝojis, ke la alia pretis helpi. La germano alparolis la kunvojaĝanton unue en germana lingvo, — ankaŭ sensukcese. Poste li provis per la franca, angla, nederlanda, hispana, itala k portugala lingvoj. La alia ne komprenis. La situacio fariĝis malagrabla por la komercisto, ĉar antaŭe li ja asertis al la kelnero, ke tiu nur bezonas lerni ankoraŭ *unu* lingvon el okcidenta Eŭropo por esti komprenata en la tuta mondo. Kaj li mem sensukcese provis eĉ per *sep*. Li jam kredis vidi mokan trajton en la vizaĝo de la kelnero. Subite la komercisto memoris, ke li antaŭ kelkaj jaroj, nur por pasigi la tempon, lernis esperanton. Ĉar li momente ne sciis alian eliron, — tute simple li demandis la pasaĝeron: “Ĉu vi parolas esperante?“ Kun videbla ĝojo la alia respondis tuj per: “Jes, sinjoro!“ Per la mondlingvo oni eksciis, ke la alia estas svedo, kiu por sia persono lernis *kvar* naciajn lingvojn el Nordeŭropo. La tri personoj kune parolis *dudek* naciajn lingvojn, sed ili ne kapablis interkompreniĝi per ili.

Tradukis 601.

II

En Essen. Propagandvespero por esperanto inter laboristaro. Inter la aŭskultantoj hazarde troviĝis akademiulo. Dum la diskutado tiu profesia lingvisto diris: “Kontraŭ la ideo enkonduki mondskale komunan helplingvon, certe neniu prudenta homo povas ion diri. Sendube tia mondlingvo estus granda avantaĝo por la tuta homaro. Sed aliflanke, kiel patro, mi neniam estus preta, fari ion ajn por la efektivigo de tiu ideo!“ Kun miro mi demandis lin: “Kiel povas esti diferenco inter la opinio de “homo“ k de “patro“? — Iom nevole li respondis: “Vidu, — mi elspezis milojn da markoj por la studado de miaj du filoj, ĉefe por studoj de lingvoj. Kiel mi nun povus helpi enkonduki esperanton en ĉiuj lernejoj, per kio ja la infanoj de ĉiu laboristo havus la eblon sin komprenigi kun ĉiuj homoj en la mondo! Tiam ja ne plu estus *diferenco* inter ili k miaj filoj. Ne, tion ne postulu de mi! Mi ja ne volas forĵeti mian monon sen rezulto.“

Tie ĉi elparolis en nepripensita momento homo tion, kion aliaj, pli singardemaj personoj pensas. *Por konservi la diferencojn inter homoj* — do, pro nura propra intereso, oni kontraŭbatalas la progreson. Estus bone, se ankaŭ la Proletaro tutmonda same prudente agus “por *sia* intereso“.

601.

Ne atentu pli longe
por abonigi vian kurslernanton, vian korespondanton, vian labor-kunulon esperantistan al “SENNACIULO“!
Kunhelpu ankaŭ vi, ke la 100 mankantaj abonantoj estu varbataj por plenigi la 4-an milon!

de ni mem farita. Kiam ni skiis reen laŭ Volgo, krepuskis k malvarmiĝis. Malvarmon sentis precipe la manoj. La piedoj iomete laciĝis k pro tio ni skiis nerapide. Subite mi aŭdas: “Amiko, via nazo, estas blanka, ekfrotu ĝin per neĝo!“ Kiam mi ĝin tuŝis, mi eksentis ĝin malmola, — tiam mi rapide komencis froti ĝin. Post kelkaj minutoj la nazo denove estis mia. Ceteran parton de la vojo ni ĉiumomente interdemandis nin “Rigardu mian vizaĝon“, ĉu ĝi estas frosta aŭ ne?“ Ricevinte trankviligan respondon, ni daŭrigis skiadon ĝis la 17-a horo. Kiam ni venis hejmen, estis jam mallume.

Mikaelo Toporov (Samaro).

Esperanto k socialdemokratio en Nederlando

Sur la tagordo por la kongreso de la socialdemokratoj en Nederlando troviĝas denove proponoj favore al la propagando, uzo k instruo de esp-o. Tiu kongreso okazos dum pasko (20./21. aprilo). Sendu simpati-esprimojn! Zorgu, ke ili alvenu en la kongresloko je 19. aprilo aŭ 1 tagon pli frue. Adresu: S. D. A. P.-Kongreso, Gebouw “De Harmonie“, *Groningen*, Nederl.

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)

Laŭ la kongresdecido en Leipzig 1929 ni publikigas ĉi kune la adresojn de la membroj, kiuj nov- aŭ realiĝis **post apero de la jarlibro.** Rilate terorlandojn ni nenion citas, same ni ne citas la adresojn de tiuj, kiuj petis nin ne publikigi ion ajn. — Por ŝpari lokon en ''S-ulo“, ni kiel eble plej koncizigas la adresojn, ankaŭ ne citas la sektorciferojn.

(1-a daŭrigo. Vidu n-on 284)

Ehime-ken (Japanio)
15613 *Murakami-Rjotaro,* 855 Oide-cho, Juno-machi, Doogo.
Elberfeld (Germanio)
15675 *Senft H.,* Schlesswieger Str. 39, instalisto.
15674 *Karp H.,* Ritterstr. 17, seruristo.
15678 *Luterklas A.,* Hatzenbeck 1, forĝisto.
15676 **Warwel E.,* Sperberweg 20.
15677 *Warwel H.,* Sperberweg 20, lignaĵisto.
Elektroperedaĉa (Mosk. gub., Sovetio)
15702 *Emeljanov S.,* Kontoro.
Elenovka (Sovetio)
15605 *Polovinkin I.,* Izvestkovij Karier.
Enschede (Nederlando)
15673 *Rooseboom I.,* Genestetstr. 9, fervoj-konduktoro.
Essen (Germanio)
15842 *Marquardt O.,* Hammerstr. 16, laboristo.
Estacion Villa Alba (F. C. B. B. N. O., Argentino)
12639 *Bodernea N.*
Ferryville (Tunizio, Afriko)
15753 *Aubert V.,* Villa Zuretti 9.
15754 *Azzofrandi L.,* rue Robin.
15752 *Gaillot G.,* Quartier de la Briquetterie.
15755 *Poropan G.,* 4 r. Marceau.
Frankenthal (Pfalz, Germanio)
15679 *Hasenzahl Karl.*
Frankfurt a. M. (Germanio)
15709 *Heck F.,* Rödelheimer Landstr. 113.
15710 *Moessner H.,* Schenkstr. 53, maŝinseruristo.
15708 *Weimar W.,* Vorm Wald 16.
Fürth (Bavario, Germanio)
15924 *Grünbaum K.,* Stiftungsstr. 21, metallaboristo.
Gjatsk (Sovetio)
15691 *Arbatskij L.,* Poŝtkesto 5, Rodomanovo.
Glasgow (Skotlando, Britio)
8369 *Atkin J.,* Ingram Str. 207, kelnero.
15556 *Reader J.,* 121 Auchentoshan. Terrace, Springburn, N.
Goldlauter (Turingio, Germanio)
13450 *Schübel H.,* Hauptstr. 145, ff.
Göteborg (Svedio)
15659 *Carlson E.,* Bondegatan 10-b, ŝoforo.
15662 *Erikson S.,* Masthuggsliden 3, ŝoforo.
15661 *Johansson C.,* Mellangatan 18, riparisto.
15660 *Jonasson K.,* St. Backegatan 3, riparisto.
15646 *Lindström A.,* Uddevallegatan 27/4, 2 tr., lokomotivkonduktoro.
15645 *Rudkvist O.,* Örngatan 29, g. h., lokomotivkonduktoro.
Graz (Aŭstrio)
15634 *Babnik J.,* Körösistr. 151, tekn. oficisto.
15689 *Haider E.,* Hirteng. 11, seruristo.
15635 *Prauneg F.,* Karlanergürtel 18-a, magazenlab.
15760 *Schwarz J.,* Prankerg. 64, fervojisto.
15688 *Setscheny A.,* Draisgasse 18-a, seruristo.
15636 *Strohmeier G.,* Hackherg. 13, seruristo.
Gumma-ken (Japanio)
15610 *Kido-Mataji,* 35 Nakakonya-machi, Takasaki.
Haarlem (Nederlando)
15733 **Vijnrox T.,* Lijsterstr. 8, N.
Habarovsk (Sovetio)
15769 **Lunina E.,* Barabaŝevskaja 92.
Haĉmas (Zakavkazsk. ĵ. d., Sovetio)
15880 *Kolijev A.,* Sovĥoz ''Obnovlionnaja Zemlia“ maŝinisto.
Halle a. d. Saale (Germanio)
15865 *Geiling E.,* Saalberg 6.
15868 *Kuhles K.,* Trödel 20.
15867 *Rümpler R.,* Passendorfer Weg 74.
Hällefors (Svedio)
7986 *Björn G. E.,* Box 694.
Hällekis (Svedio)
15647 *Frisk H.,* Stakeklev.
Hartmannsdorf (Chemnitz, Germanio)
15587 *Röber H.,* Bergstr. 7.
15585 *Weinreich F.,* Limbacher Str. 7.
15586 *Weinreich K.,* Hohestr. 1.
Helsinki (Finnlando)
15743 *Orlov-Mikko,* Rüüsavillankatu 20, A. 7, frezisto.
Ĥarkov (Sovetio)
15687 *Jurĉenko A. J.,* Poĉtovyj jaŝĉik 309.
15573 *Karpov N.,* Bazarnyj per. 9, Lubotin regiono.
15686 *Surovcev N.,* Grekovskaj ul. Kraĥmalevskij per. 9.
Ĥmelevici (Niĵegor. Kraj, Sovetio)
15899 *Puŝkarev B. G.,* instruisto.
Ilovajsk (Stalin, okr., Sovetio)
15714 *Ĉernobaj Ĥ.,* s. Gruszko-Lomovka.
Irkutsk (Sovetio)
3378 *Rukavicin I.,* N.-Amurskaja 31, profesoro.
Ivanovo-Voznesensk (Sovetio)
15858 *Belov A. V.,* Tipografskaja ul. 11, oficisto.
15693 *Lazarev A.,* ul. Dzerĵinskogo 1, kv. 2.
15884 *Orlov A.,* Miĥajlovska 32, lernanto.
Jalta (Sovetio)
15668 *Stoljarĉuk,* ul. Vinogradnaja 7, kv. 33.

(Daŭrigota)

MALGRANDAJ NOTOJ

Alvoko de la Nederlanda LEA

La Nederl. Federacio de Lab. Esp-istoj intencas eldoni dum la 1. majo specialan nederlandlingvan propagandan n-on de sia organo "Lab. Esp-isto". El ĉiu lando ni bezonas saluton k instigon per *nur kelkaj vortoj* esplingvaj, por ke ni povu traduki ilin. Ĉiuj LEA-sekretarioj (kie ne ekzistas LEA, sendu iu redakcio de gazeto aŭ lab. grupo la petatan) estas petataj plenumi nian deziron. Ni sendos la rilatan n-on de "L. E." rekompence. Adr.: NFLE, Middenweg 226, *Amsterdam*, Holando.

Konkurad-alvoko

Mi alvokas ĉiujn lokajn SAT- k SEU-organizojn por konkurado laŭ jenaj punktoj: 1. Barnaula esp. organizo jam mendis ĉe SAT 30 ekz. "S-ulo" ĉiusemajne, 50 ekz. "La Lernanto" ĉiumonate, 20 ekz. "La NE", kiujn ni disvastigas per div. librovendejoj en nia urbo. (Krome la SAT-anoj mem abonas "S-ulo"n senpere je pli ol 50 ekz. — 2. Same ni mendis ĉe SEU 20 ekz. "Informoj" k 20 ekz. "Bulteno", kiujn ni celas disvastigi eĉ inter neesp-istaro. — Kiu la unua revokos? Diru viajn kondiĉojn.

SAT-peranto S. Goldfeder, Barnaul (5448).

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

ESTONIO. Pärnu. 3. feb. komenciĝis kurso ĉe knab-gimnazio, gvidata de K-do E. Mälson laŭ rekta metodo, partopr. 36 gimnazianoj. La lernej-administracio subvencias mone la kursarangôn. 22. 2. estis solena finvespero de esp. kursoj ĉe Lab. Esp. Klubo gviditaj de A. Strandmark. Partopr. ĉ. 150 p., ĉar ĉeestis ankaŭ esp. nekursanoj. Programo el reciprokaj salutoj, adiaŭoj, transdono de donaco al kursgvidinto, danco k ludo. Post kelkaj tagoj komenciĝos nova kurso; gvid. K-do Mälson. — *Kilingi-Saunametsa.* 1. 2. paroladis tie K-do Ruŭs (15 248) pri esp. en kontraŭmilita movado antaŭ ĉ. 100 kamparanoj. — *Vana-Kariste.* Ĉar ĉi tie estas neniu esp-isto k mankas rimedoj por venigi lektoron, ĉe junsocialista societo komencis lerni 10 junuloj laŭ "Petro" memstare. — *Sindi.* Kurso gvid. de K-dino Peterson finiĝis en fino de febr. (15 428). — *FRANCIO. Parizo.* K-do Gaillard (12 218) laboras ĉe nova esp. grupo el naturamikoj, branĉo de "Trait d'Union" (Kunigilo aŭ Interliga Streko), Naturista Societo por Homa Kulturo, kiu propagandas i. a. vegetarismon k fondis esp. ĥoron. Kunvenoj ĉiumerkrede. — *GERMANIO.* La LEA-distrikto de l' Dresdena industriregiono kunvenis 8./9. febr. en Dresdeno kun ĉ. 100 Gek-doj. El la raportoj estas notinde, ke la aŭtune komencitaj kursoj estas kontentige vizitataj (kursoj estis malfermataj en 22 lokoj de l' distrikto). — *Augsburg.* La grupo faris sukcesan peresp-an laboron k peris multe da korespondado por organizoj. Membrostato: 82. Pli ol 100 kursanoj en 5 kursoj. — Novaj LEA-grupoj fondiĝis laŭ "Arb. Esp." en jenaj lokoj: Rheinhausen, Neuboscheln (Rejnl.), Warnemünde, Güstrow, Frankenthal (Pfalz). — *NEDERLANDO.* El la jarraporto por 1929 aperigita en febr.-n-o de "Lab. Esp." ni notas jenon: En dec. 1928 estis 8 sekcioj kun 164 membroj, en dec. 1929 — 22 sekcioj kun 379 membroj; krome estas 30 ĝeneralaj, 32 simpatiantaj membroj k 9 simpat. organizoj. Sume la Federacio havas 441 membrojn. El ili 158 p. troviĝas en Amsterdam. La Fed. eldonis en 1929 — 62 mil flugfoliojn. Ĉar okazis intern. lab. sportfesto en Hago, la Fed. disdonigis proprakoste propagandfolion. En Amsterdam, Rotterdam, Leeuwarden la membroj partoprenis kun propraj flagoj la majmanifestaciojn. Dum 6 monatoj okazis radio-disaŭdigoj holand- k esp-lingve ĉe "VARA" (Hilversum), kien devis iri ĉiusemajne niaj K-doj Faulhaber, Krijt k Lem jr. el Amsterdam. Dum la lastjara (14-a) kongreso la Fed. akceptis la Konvencion kun SAT. — *SOVETIO. Barnaul.* En tiu relative malgranda siberia urbo estas 100 SAT-anoj k ĉ. 30 SEU-anoj. Novaj kursoj ĉe milicio (15 p.), agrar-teknikumo (30 p.), klubo de konstruistoj (2 grupoj), 2-a sovetlernejo, akvo-transportista lernejo (30 p.), lab. vesperkursoj (25 p.) en Zaton, 17-a lernejo, kie en 4-a k 3-a grupoj esp. estas instruata kiel deviga objekto. Distrikt-kursoj de poŝtfakgvidantoj havas esp-on kiel devigan lernobjekton pro nia vasta koresp-ado. Same urbaj kursoj de junpionir-gvidantoj. En la regiono ekzistas kursoj en Pavlovsk (15 p.), Talmenka (20). 5000 poŝtkartoj havas esp-lingvajn surskribojn. La gazetaro presigas kursojn. Ĉe loka domo de kom. klerigo elmetiĝas "S-ulo" k "SEU-Bulteno". Bedaŭrinde mankas sufiĉaj organizadresoj eksterl. por la intern. interligo. (13 503.)

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Miĥaelo Babits "LA CIKONI-KALIFO". Romano. El la hungara tradukis Karlo Bodo. Eld. Rud. Mosse, Esp. Fako, Berlin. 1929. Formato 10,5×16 cm. 187 pĝ. Biblioteko Tutmonda, n-oj 23—25. Prezo nemontrita.

Kiam mi komencis legi tiun ĉi romanon, mi ĝojis: "Jen talenta aŭtoro! Ili estas tiom malmultaj! Fine mi povos entuziasmiĝi!" Sed ho dolor'! La romano poste malkovriĝis tute ridinda, tute mallerte prezentis modan burĝan temon? duobla esto, "dupersoneco" de la sama persono.

Riĉa homo, virta, estas samtempe malriĉa diboĉa oficisto. La du korpoj de tiu "ambaŭ-viro" kun sola animo, *vivas malproksime* unu de l' alia. Kiam la riĉulo ekdormas, la alia korpo, la oficisto, ekvekiĝas. Poste la oficisto ekdormas ĉe enuiga laboro, ĉar lia kun-animano la riĉulo deziras vekiĝi. Se iu akcidento vekas unu el ambaŭ, la dua tuj akcidente ekdormas, dumtage aŭ dumnokte, ĉar ambaŭ vivas en la sama terzono, en la sama horzono.

Komika temo, tute ŝerca! Ne. La aŭtoro traktis ĝin serioze, stulte k stultige. La virta riĉulo suferas, ĉar restas en li iaj "malvirtaj sentoj" de la diboĉa proleto. La diboĉa prolet-oficisto suferas, ĉar dum la diboĉo mem estas en li iaj "virtaj sentoj" de la ĉasta riĉulo: li kompatas sin mem, malkvieta. (Ĉio tio, plena da kristanaj antaŭjuĝoj pri virto, malĉasto, sankto, malpuranimeco.)

Fine la diboĉa oficisto, turmentita de la "virtoj" de l' riĉulo, memmortiĝas per revolvero kontraŭ kapo, — k oni trovas la ĉastan, morale turmentitan riĉulon en alia regiono, mortinta pro revolverpafo en kapon, sed sen revolvero. Mi ne mencias la sadismajn detalojn pri mortigo al iu virino.

Certe, ekzistas sufiĉe bonaj romanoj pri "duobla personeco" (duobla esto) de la sama persono, kompreneble ĉiam en la sama korpo, sub influo de heredo, de nerva malkvieto, kvankam tiu literatura burĝa modo naskis plejparte ridindaĵojn.

Kaj mi ne estus kredinta, ke talenta aŭ netalenta aŭtoro skribus verkon tiom ridindan, kiom tiu vagado de unu "animo" inter du korpoj. Stultega malkompreno de studoj pri faktaj "dupersonecoj" aŭ "multpersonecoj" de iaj nervmalsanuloj.

Jief.

Stockholm. Svedlando. La Stokholma Ekspozicio 1930. Bela ilustrita gvidilo tra la sveda ĉefurbo, eldonita de la Sveda Trafika Asocio k Stokholma Ekspozicio. Senpage havebla de: Stokholma Ekspozicio, *Stokholm*, Svedio.

The Sino-Russian Crisis (La Ĉino-Rusa Krizo). Publikigita de: The International Relations Committee, *Nanking*, Ĉinio, n-o 5, Mao-tan Street. 105 pĝ. Form. 18×26 cm. Materialo pri la manĉuria fervoja konflikto prezentita de l' ĉinia registaro. Anglalingva.

Léonid Andrenko, L'Uniformité de la Vie dans L'Univers. Préface de N. Morosov. Association Internationale Biocosmiue, J. Estour, Solliès Pont (Var), Francio. 24 pĝ. Form. 12×18 cm. Franclingva studo pri la universo k vivo de l' astroj.

NIA POŜTO

6604. — Via artikolo aperos (resumite pro lokomanko), ankaŭ la versoj. Pro la koresp. deziro sendu koncernan anonc-tekston al Adm., pagante laŭ indikita tarifo.

13 563. — Ni sendis la artikolon al red. de "Jun. Pĝ."

13 794. — Ni preferas orig. artik. Ni ne povas uzi. Ankaŭ oni lasu al anglalingvanoj fari tradukojn el la angla.

1255. — Via artikolo certe aperos.

11 297. — Via artikolo en venonta n-o. *Red.*

15 877. — Ne risku tro multe en simpla let. Vi ankaŭ povas sendi ĝin rekomendite, ĉar tiele oni ne ebzonas tiom pagi, kiom ĉe valorletero.

670. — "SPR" estas presata k ekspedata en Moskvo. Ĝis nun ni mem ne ricevis ĝin.

259. — Ĉar vi nek citas la grandon de la anonco nek la sumon pagitan, ni devas atendi la liston. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

— Kiu ŝatus komunan veturadon al la SAT-kongreso en Londono per biciklo? Junuloj-sportuloj skribu al K-do Alfred Setscheny, Draisgasse 18, *Graz.*

— Esp. rondo koresp. kĉl, krom Germanio. Provizora adr.: Anton Haberlik, Peter-Tunner-Str. 20, *Leoben,* k K-dino Anna Stotz, *Judendorf, n-o 32 b. Leoben.*

FRANCIO

K-do Robert Boissel, 45 rue Dumont, *Sotteville les Rouen* kĉl pri ĉ. temoj, L, PI, certe resp.

K-do A. Gluard, 91 rue Nationale, *Chateau du Loir,* Sarthe, L, PK kun Sovetianoj.

K-do J. Grosshans (19 j. komencanto), *Baldenheim,* Bas-Rhin, PI, bfl. kun K-dinoj.

K-do Fr. Renard (25 j. fraŭlo), 23 rue de la Princerie, *Metz,* Moselle, kĉl, PI, gaz. Resp. garantiata.

GERMANIO

— LEA-lokgrupo (15 Gek-doj, 15 ĝis 54 j.) koresp. kĉl, L, PK, PI, bfl, pri ĉ. temoj. Prefere pri politiko, ateismo. Interŝ. gaz. il., fotojn, esp-aĵojn ktp. Adr.: K-do Karl Hasenzahl (por LEA-grupo), Mühlstr. 15, *Frankenthal* (Rheinpfalz). — Certe resp.

— Juna esp. grupo koresp. kĉl. Resp. garantiata, L, PI, bfl. Adr.: K-do J. Dresel, Prager Str. 190, *Hersbruck* (Bavario).

K-do Artur Breuer, Oberstr. 29. *Radeberg/Sa.,* kĉl, PK, PI. Resp. garantiata.

— Kial ne resp. al miaj L jenaj Gek-doj: Kolpakova (14./2.), Kalaĉev (16./2.). Ĉu vi ne ricevis miajn L. Mi petas nepran resp. Adr.: Welward, Lachnerstr. 3./4., *Karlsruhe.*

K-do W. Nittka, Unnaer Str. 19, *Dortmund,* kĉl, PM k donas PM por monbiletoj k moneroj.

K-do Rudolf Pfützner (15 654), Karlsruher Str. 21/1, *Dresden-A.* 27, kĉl, pref. kun transmaraj landoj, L, PK, PM pri muziko ktp. Resp. gar.

K-do Daniel Fiŝer (15 749), Pirmasenser Str. 94, *Kaiserslautern/Pfalz,* serĉas serioz. koresp-adon kun sudlandaj Gek-doj. L, PK, PI. Certe resp.

JUGOSLAVIO

K-do D. Banovina (abelkulturisto), *Deliblado,* kun abelbredista praktikulo en Sovetio.

SAARLANDO

— Esp. grupo "Nova sento" St. Ingbert koresp. kĉl, PI, PM, fotoj. Adr.: L. Weidmann, Neue Mess-str. 22. *St. Ingbert.* — Nepre resp.

SOVETIO

— Sendu 100—200 PM div., vi ricevos samkvante Sovetiajn: Grinev S., Raz'ezĵaja, 15, kv. 18, *Leningrad, 2.*

— Grupo de laboristinoj koresp. kĉl pri virina movad., vivsituacio ktp. *Leningrad,* ul. Edissona, 12, zav Kulakova, 12 otd. al K-dino Abrajtis.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

K-do Kapustin P., Palevskij, 38/2, kv. 9, *Leningrad,* 29, koresp. kĉl. maristoj.

— Ge-lernantoj 13—17 j. koresp. kolektive kĉl. Skribu multnombre. *Leningrad,* Socialistiĉeskaja, 7, 52 ŝkola

— Fervojistoj koresp. pri polit. situac. revol. k sindik. mov. *Leningrad, 33,* Proletarskij zavod, redkol. "Proleta Tribuno".

— Esperanto rondeto, *Leningrad,* Vas. Ostr., 22 linia, 5 kv. 17, koresp. pri ĉ. t.

K-do Viktor Naumenko, Komisarskaja 127, *Semipalatinsk,* kĉl pri div. junulartemoj k turismo, pref. kun junuloj.

— Pri revolucia movado k vivkondiĉoj de lab-istoj ĉl. koresp. Nordkaŭkazia Komitato de IRH. Skribu multnombre! Adr.: *Rostov/Don,* Poĉtov. jaŝĉik 82, Esp. Komitato, por IRH.

— Junpionira taĉmento koresp. kĉl pri infanmovado, lernvivo k. a. temoj. Adr.: *Kirikovka,* Ĥark. okr., Ukrainio, 7 letka.

— 13-jara lernanto koresp. kun gelernantoj k pioniroj ĉl. pri infanvivo. Adr.: *Kirikovka,* Ĥark. okr., Ukrainio, 7-jara lernejo al Iv. Bagatyrenko.

K-do Jogan Mirosniĉenko, str. Frunze domo de fervojistoj, 14, *Taganrog,* kĉl pri ĉ. temoj, L, PK.

K-do Béŝkarev, Lunaĉarskogo 39, *Kimri,* Mosk. obl., kĉl, L, ĵurn., gaz. (nacilingvaj). Resp. garantiata.

K-do Mikaelo Vinogradov, Sverdlovstr. 45, kv. 7, *Irkutsk,* kĉl pri ĉ. temoj, L, PK.

K-dino S. Kalaŝnikova, Gospitalnaja pl. 10, kv. 2, *Moskvo 20,* pri ĉ. t. kĉl.

— Gerondetanoj de div. nacioj koresp. kĉl pri ĉio. Adr.: *Pskov,* Klubo "Trud" (Laboro), Esperanto Kruĵok.

K-do B. Slobodĉikov (21 j. laboristo), Spartakovskaja ul. 18, kv. 3, *Moskvo 66,* kĉl, pref. kun Ameriko, Aŭstralio, Afriko, Turkio, Japanio, Ĉinio. L, PK, PI, PM, bfl, il. gaz., ĵurn. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do J. Zilberfarb, Kloĉkovski spusk, d. "Knihar i Tabaĉnik" kv. 97, *Ĥarkov 12,* Ukrainio. Korektu en jarlibro!

K-do Zemljakov (j. laboristo), Lekkerta 91/i, *Odessa,* pri ĉ. temoj kĉl, PK, ilustraĵoj ktp. Resp. garantiata.

K-do Gregoro Nikulin (kudraĵisto), Sadikovskaja 40, *Odessa,* pri politikaj, ekonomiaj, profesiaj k. a. temoj, belaj PK, gaz., fotoj ktp. Resp. garantiata.

K-dino Mac Cila, str. de Kotlov 80, kv. 3, *Ĥarkov,* kĉl pri ĉ. temoj.

K-do B. Makarov, Tuzov proezd 8. kv. 5, *Moskvo 18,* kun leterportistoj k poŝtistoj.

K-do J. Gordon, Aleksandrovskaja 80, kv. 3, *Moskvo 18,* kĉl. junuloj, PI. Resp. garantiata.

K-do P. Nikitin (19 j., studento, komencanto), 1 Perejaslavskij per. 6, kv. 13, *Moskvo 10,* kĉl, L, PI, PM.

K-do N. I. Ĉistjakov, Starosadskij per. 9, kv. 4, *Moskvo,* kĉl pri radioamatoreco k. a. temoj, L, PK, PI, PM, libroj, il. gaz., papermonoj ktp. Resp. garantiata.

K-do M. I. Karpenko, Rakovka, *Krjukovo/Dnepro,* Ukrainio, kĉl pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-do Ĥvorostin (stud. de universitato), 6 linia 47-a kv. 5, *Leningrad, 4, V. O.,* kun Germanio, Aŭstrio, Francio.

— Studentoj de Universitato, *Leningrad, V. O.,* Universitato, kĉl, precipe kun studentoj k gejunul.

— Gelernantaro koresp. kĉl pri ĉ. temoj. Nepre resp., *Barnaul,* 6-a Sovet-lernejo.

— Scienca Kabineto de Terkulturo k Kamparana Mastrumado interŝ. sperton k ekspozaĵojn kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

— 20 instruistoj koresp. kĉl, L, PK. Resp. gar. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Domo de Klerigado, BRO.

— 100 gelernantoj interŝ. L, PK, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* 9-a Laborlernejo, Gogolstr.

SOVETIO (daŭrigo)

— Esp. rondeto de fervojistoj koresp. kĉl, L, PK, PI, gaz. Adreso: *Samara,* poselok N. Orenb., Kruĵok Esperanto, Klubo de K. Libkneĥt.

— Viglan koresp-adon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

— Scienca Kabineto de Geologio k Mineralogio interŝ. sperton k ekspozaĵojn. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

SVEDIO

— Geesperantistoj ĉl. helpu nin disvastigi esp-on inter gelaboristoj de la norda parto de Svedio. L, PK, PI, esp-aĵoj por esp.-ekspozicio. Adr.: Esp. Klubo "La Verda Stelo", Poŝtkesto 205, *Karlsborg.*

— Mi koresp. kun esp-istoj ĉl. en Internacionalstenografio per L, PI, pri ĉ. temoj. Adr.: M. Holmgren, Sàve Strandgata 7, *Göteborg.*

K-do Harry Nilsson, Ehrensvärdsgatan 20/II., *Malmö,* kun Sovetio, por ricevi informojn pri la stato en tiu lando, L, PI, gaz.

USONO

— Ne plu sendu poŝtaĵojn al mia meksika adr., ĉar ĝi ne plu validas. Post la 1. majo oni povas uzi mian malnovan adr.: J. M. Kerr, 1114 Inca Str. *Denver,* Colo.

K-do NAT ROBBOY (10129)
North Blod.
CLEVELAND, Ohio (Usono)
deziras korespondi, interŝanĝi gazetojn, revuojn kun Gek-doj el ĉiuj landoj. Certa respondo.

3 junaj laboristoj

deziras korespondi per L, PK, PI kun ĉl. pri div. temoj: Mikaelo Ĵiganov, radio-amatoro, 16-jara komjunulo, adr.: Uljanovsk, Zavolĵie, Raboĉij gorodok 6 kv. 9; Karcev Paŭlo, 18-jara komjunulo, seruristo, adr.: Uljanovsk, Zavolĵie, Raboĉaja ulica 26 kv. 3; Nikitin Vladimir, 21-jara seruristo, adr.: Uljanovsk, Zavolĵie, Leningradskij pr. 11 kv. 6.

FILATELISTOJ!

Dezirante plifaciligi la interrilatojn kun eksterlando al apartaj kolektantoj, firmoj k eldonejoj filateliaj, mi decidis eldoni "Adreslibron" por la Filatelia Mondo.
Tiu "Adreslibro" prezentos plej malkaran reklam-eblon. La adresoj estos presataj senpage. Koncernaj deziroj ne devas enteni pli ol 20 vortojn. Mi petas nur sendi al mi tiom da pli valoraj poŝtmarkoj, el kiom da vortoj konsistos via deziro. La prezoj por *apartaj anoncoj* en la Adreslibro troviĝas malsupre.
Atendante la alsendon de via ŝatata adreso[1], mi restas estimplene
Wladyslaw Lekowski.

Prezoj de la anoncoj:

	zlot.	dol.	mk. g.	kr. ĉek.
1/1 paĝo	25.—	4.—	15.—	125.—
3/4 „	20.—	3.—	10.—	95.—
1/2 „	13.—	2.—	7.50	60.—
1/3 „	9.—	1.50	5.—	45.—
1/4 „	6.—	1.—	3.75	30.—

(1/1 = 15×23 cm.)

Tekston de anonco kun la koncerna sumo mi sendas ĉi-kune, al s-ro
Wladyslaw Lekowski, Piastow, kolo Warszawy, ul. Napoleonska, dom Mijasa.

[1] Nomo k antaŭnomo . . . .
Adreso . . . .
La deziroj . . . .
Mi deziras / ne deziras / la Adreslibron

Franclingvanoj! Legu k abonu:

LA CRI DU PEUPLE

semajna, grandformata ĵurnalo por la propagando de la revolucia sindikatismo. Abonprezo: sesmonata 10 fr. fr.; unujara 20 fr. fr. — Petu provnumeron, sendante 0,50 fr. fr. Adr.: Poŝtĉeka konto 525 67, *Paris.* René Deveaux, 123, rue Montmartre.

"Le Cri du Peuple" serĉas korespondantojn en la tuta mondo pri la revolucia sindikatisma movado. Skribu en esperanto al la ĉi supra adreso.

JUBILEA ATEISTA DATO

La 19-an de aprilo okazos la kvinjara datreveno de *Unio de Militantaj Ateistoj*
en USSR.

Liberpensulaj, komunistaj, junkomunistaj, pioniraj organizoj de l' tutmondo, apartaj K-doj **sendu viajn unuecfront. salutleterojn.** Ĉiu ricevos jubilean n-on de "Bezboĵnik" ĉiam memoru adr., kiu taŭgas ankaŭ por sendi ateistajn artikolojn: *Moskvo, Sretenka, 10, Centra Konsilantaro de Unio de Militantaj Ateistoj.*

Lernu sen instruisto en kvar horoj Internacional-stenografion!

Ĉiu skribas en ĉiu lingvo per Internacionalstenografio (Isto) kvar-kvinoble pli rapide ol per la ĝisnuna longa skribo; rapidskribistoj eĉ dekoble. Ĉiu sono, ankaŭ vokalo, estas skribata per streko, ne simbole, ne plidikige. Sesjaraj infanoj lernis Iston pli facile k pli rapide ol la longan skribon. Fakto notarie atestita! Isto estas egale taŭga por esp-o k por ĉiuj kulturlingvoj sen alilernado de sonstrekoj. Esp.-lingvaj gvidiloj por 22 lingvoj estas disvastigataj en ĉiuj landoj.

Isto kaj *Esperanto* aspiras la *saman celon.*

	mk. g.
Internacionalstenografio por esp-o (fundamenta lernlibro)	1.—
1-a aldono: Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, Rusa	1.—
2-a aldono: Sveda, Dana, Nederlanda, Portugala, Rumana, Greka, Latina . .	1.—
3-a aldono: Serba, Bulgara, Ĉeĥa, Ukraina, Hungara, Turka, Japana .	1.—

Ĉiu aldono donas esp. la uzadon de l' stenografio por sep lingvoj.

Instituto de Internacionalstenografio, Duisburg (Germ.), Friedenstr. 79, Poŝtĉeko Essen 2714.

Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (krom sovetianoj).

FRUKTKOMERCISTO

dez. koresp. pri fruktkomerco k -kulturo, esp-ismo, vivostato ktp. PI, kĉl. Resp. garantiata. Adr.: Rudolf Hondl, Niederstrato 36, *Gottesberg i. Schles.* (Germanio).

Pionira Komuno
(ĉe Kuŝĉova Klubo) aranĝas
letervesperon
kun ekspozicio por la 8-a de marto (Internacia Virintago). Gek-doj tutmondaj! Helpu fari la vesperon interesa! Nepre respondos al ĉiuj! Adr.: *Zinovjevsk,* Kuŝĉova Infana Klubo, Ukrainio (Sovetio).

Fabrikaj komjunula k IRH-ĉeloj, pionir-taĉmentoj k laborista klubo dez. koresp. kun la samaj organizoj alilandaj. Adr.: USSR, *Keret,* Karelio, L/u, N. 42, P. Jasinski.

ĈELO DE IRH

ĉe la profesia lernejo n-o 2, petas IRH-ĉelojn en ĉ. landoj interkorespondadi. Sendos L, PK k. a. por ekspoziciaĵoj, koresp. pri laboro de IRH. — Adr.: USSR, Ukrainio, *Zinovjevsk,* ul. Gogola, 2-a profŝkola.

LABORISTA ESPERANTA GRUPO ĜENEVO

(Svisio), *6, Rue Terreaux du Temple,* petas ĉl. Gek-dojn k esp. grupojn sendi esp. materialon (afiŝojn, gazetojn, leterojn ktp.) nepre antaŭ la 25. marto 1930. Tiu materialo estas uzota en ekspozicio dum lab. muzika festo. La grupo volonte interŝanĝos k certe resp.

Atentu! Kiu dez. havi praktikan korespadon pri bestbredado, porkobredado, laktindustrio k legomplantado, volu skribi al: N. Ŝumilov, poŝtkesto 3, sovĥoz "Krasnij Pahar", *Opoĉka,* Pskov. okr. (Sovetio). — Respondeca direktoro de soveta ŝtata agromastrumejo "Ruĝa Plugisto".

Bakistoj! Atentu!

Ĉu estas esp. amikoj, kiuj volas interrilati kun ni por interŝ. spertojn pri panbakejoj, teknike, konstruo de panfornoj, analizo de faruno k fermento, baki per vaporo. Ni estas panbakejo produktanta 2500 panojn po horo en unu el niaj fornoj. Skribu al: Frans Engels, De Keyzerlei 12, **Antverpeno,** Belg.

★ Krivoj-Roga ★

Supera Fermina Instituto *petegas* ĉ. ferminĝenierojn k K-dojn kun supera klerigo k ĉ. ligitajn k konatajn kun industrioj, koresp. pri div. teknikaj k. a. temoj. — Ni ĉ. studentoj petegas tion plenumi por montri al konservativa scienca mondo, ke esp. povas esti uzata en la scienco. — Krome nia korespado konvinku nin, ke per esp. ni povas interŝ. nian sperton k ne nur dissendi salutlet. Adr.: USSR, Ukrainio, *Veĉernij Kut.,* Veĉernij Gornij Instituto (VRT), al rektoro de l' instituto.

ENHAVO:

	paĝo
La industriigo en suda Usono kaj la negra problemo	**277—278**
Kiu kaj kial likvidas preĝejoj en USSR?	**278**
Orientlando kaj Okcidentlando	**279**
La Kapitalista Milito	**279**
Sub la jugo de l' Islamo	**280—282**
Kulturtaskoj	**280—281**
Vilaĝa komunumbaloto en Bulgario	**282**
Masarik 80-jara	**282**
Diskutejo	**282**
Esperanto-Servo	**283**
Sennaciula Sporta Paĝo	**284—285**
Tra Esperantio	**285—287**
Korespondado, Anoncoj	**287—288**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)